

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esperanto

872 II

IVAN H. KRESTANOV

EL LA PROKSIMA ORIENTO

(DE UKRAJNIO ĜIS GEORGIO)

KUN ETNOGRAFIA KARTO



Bulgara Esperanto-Biblioteko
Serio II, N-ro 2

Ivan H. Krestanoff

Dresden-A.16.

IVAN H. KRESTANOV

EL LA PROKSIMA ORIENTO

(DE UKRAJNIO ĜIS GEORGIO)

KUN ETNOGRAFIA KARTO



Bulgara Esperanto-Biblioteko
Serio II, N-ro 2

Bulgara Esperanto-Instituto

BUC. P.

Bulgara Esperanto-Biblioteko
BUDAPESTO
VI, Erzsébet körút 10.

Esperanto



V-11217

Enhavo

| | |
|------------------------|----|
| Antaŭparolo | 5 |
| Ukrajnio | 7 |
| Litovio | 17 |
| Blankrutenio | 24 |
| Letonio | 30 |
| Estonio | 38 |
| Finnlando | 44 |
| La Tataroj | 53 |
| Georgio | 60 |

Dediĉata

al nia plej grava organizaĵo

Universala Esperanto-Asocio

kunliganta idealon kaj realon

Antaŭparolo

Nia karmemora Majstro kredis, ke komunikiĝado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la pli grandan parton de tiuj bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de reciproka sinnekonado kaj devigata sinaltrudado.

Deirante el tiu penso kaj opiniante, ke ĉiuj nacioj estas egale interesaj, ni skribas pri ankoraŭ nesufiĉe konataj popoloj de la antaŭa rusa imperio, tiamaniere farante malgrandan escepton el la programo de nia Biblioteko. Kompreneble, krom la priparolitaj popoloj: ukrainoj, litovoj, blankrutenoj, letonoj, estonoj, finnoj, tataroj, georgoj, en la limoj de l'malnova rusa regno loĝas ankaŭ aliaj, kiel ekz. poloj, kies historio estas sufiĉe konata okcidente, kaj granda nombro da gentoj, kiuj tamen ne ludas gravan rolon en la historio kaj kulturo. Ni esperas, ke aliaj sekvos nin sur la vojo al ekkoniĝo kaj kunfratiĝo de l'popoloj, rakontante pri la ceteraj partoj de l' homaro.

Por tiu ĉi verketo ni utiligis diversajn aŭtorojn, precipe prof. Brocher („Essais sur les principales Nationalités de Russie“), al kiu ni ŝuldas koran dankon. La artikoloj estas korektita kaj kompletigita represaĵo de tiuj aperintaj en „Esperanto“ 1918—1919. La eldono estas grandparte monhelpita de la koncernaj misioj de tiuj ŝtatoj en Svisio. Ĝin aperigante ni kontentigas ankaŭ la dezirojn esprimitajn de kelkaj samideanoj.

Bern, Julio 1919.

I. H. K.

Ukrajnio

Antaŭ ĉio, ni devas rimarkigi, ke Ukrajnio ne estas nova regno. Oni nur rememoru pri la Kieva princlando de Oleg, Olga, S-ta Vladimir kaj de la konata princo Svjatoslav. Tiu ĉi glora princlando, kreita en la IX^a jarcento de la samaj slavaj gentoj, kies idoj loĝas ankaŭ nun la vastan teritorion de Ukrajnio (poljanoj, drevljanoj, severjanoj, ugličoj, tiveroj, duleboj), estis nomata komence „Rus“. Ĉar tiu ĉi nomo estis pli malfrue proprigita ankaŭ de la Moskvaj princoj, la ukrainoj estis devigataj serĉi alian nacian nomon. Tamen ankaŭ la nomo „Ukrajnio“ estas tre malnova. Ĝi renkontiĝas jam en la analoj de la XII^a kaj XIII^a jc., en la universaloj de la kozakaj hetmanoj de la XVII^a jc., en la manifesto de Petro la Granda de 1709, en la popolkantoj, por signi precipe la orientajn apudlimajn stepajn „randojn“ (*ukraina*, de kie Ukrajnio) de la iama Kieva regno (IX^a—XII^a jc.). Tiu ĉi nomo iom post iom disvastiĝis kaj ĝi hodiaŭ signas la tutan ukrainan etnografian teritorion. La rusa nomo „Malorusia“ (Malgrand-Rusio) estas pure literatura. La ukrainoj hodiaŭ ĝin decide forpuŝas, kiel ankaŭ la aŭstran „Ruteno“.

La etnografia Ukrajnio formas grandegan unuigitan teritorion, etendiĝantan de Karpatoj ĝis Kaŭkazo kaj de la rivero Pripjet ĝis Nigra-maro. La areo de tiu vasta teritorio atingas 850,000 km², el kiuj 770,000 en la estinta rusa imperio, 75,000 en Galicio kaj 14,000 en Hungario. Ĝi ampleksas la sekvantajn guberniojn: Kiev, Podolio, Ĉernigov, Volinio, Poltava, Ekaterinoslav, Ĥarkov, Ĥerson kaj kelkajn distriktojn de la gubernioj Taŭrido (Krimo), Kursk, Ĥolm, Voronej, Minsk, Grodno.

Pri la nombro de la ukraina loĝantaro ni ne ankoraŭ havas tute precizajn statistikojn. Prenante difinitan koeficienton por la kresko de la loĝantaro oni ricevas por la lastaj jaroj ciferon de 46 milionoj da ukrainoj, el kiuj

39,604,000 en Ukrainio mem, 5,839,000 en Galicio kaj 658,000 en hungara Ukrainio. Sed se ni akceptus eĉ la ciferon 35 milionoj, kiu estas malalta, Ukrainio okupas laŭ la nombro de sia loĝantaro hodiaŭ la sesan lokon inter la eŭropaj regnoj kaj la duan inter la slavaj. El la tuta loĝantaro, la ukrainoj formas 77,5 %, la hebreoj 8,2 %, la poloj 4,5 %, la germanoj 1,9 %, kaj post ili venas la armenoj, rumanoj, bulgaroj, tataroj, grekoj, k. a. La pli gravaj riveroj de Ukrainio estas: Dnjester, Dnjeper kaj Don, kaj la ĉefaj urboj: Kiev, Odessa, Ĥarkov, Lvov (Lemberg).

En rasa rilato la ukrainoj, laŭ la opinio de la plej bonaj rusaj scienculoj, distingiĝas de la rusoj per pli alta staturo, per pli larĝa torakso, pli ronda kranio, pli grandaj kruroj; la plimulto estas nigrokula kaj brunvizaĝa. Tiuj apartaĵoj estas ŝuldataj parte al la miksiĝo kun fremdaj rasoj, precipe turko-tataraj, kaj en tiu rilato la ukrainoj staras pli proksime al la bulgaroj.

En psikologia rilato la ukrainoj distingiĝas ankoraŭ pli profunde de l' ruso kaj proksimiĝas ree al la bulgaro. Li estas pli individuema, pli agema, pli granda realisto en la vivo, tial li estas pli indiferenta ankaŭ al dogmaj disputoj. Lia medita naturo estas inklina al skeptikeco kaj kritiko. La ukrainoj malfacile decidiĝas, sed obstine tenas sian opinion. La ukraina „obstineco“ estas fama. Al tio ĉi li ŝuldas kaj ŝuldos en la estonteco siajn grandajn naciajn sukcesojn. Li distingiĝas ankaŭ per sia subtila humoro. Ne vane Gogol estis ukrainoj.

* * *

En la IX^a jc., la lando okupita de la ukrainoj estis dividita en tre granda nombro da malgrandaj sendependaj ŝtatoj, sed la Kievaj princoj, subtenataj de volontula armeo, submetis tiujn monarkojn kaj unuigis iliajn teritoriojn. En 988, la Kieva princo Vladimir enkondukis la kristanismon laŭ la orient-ortodoksa formo. De post li la greka civilizo penetris en Kievon, kiu fariĝis en kelkaj jarcentoj sidejo de kulturo kaj arto. Post ĝia falo, la reĝlando Galicio kaj Lodomerio (Danilo, Lev en XIII^a kaj XIV^a jc.) estis restarigita, kaj fine la grandduklando Rutenio sub la litova dinastio (Svidrigal kaj Olekoviĉ en XV^a jc.).

La duko de Litovio fariĝis reĝo de Polio kaj fondis la dinastion de Jagelloj. Litovio kaj Ukrainio devis konservi siajn leĝojn, apartan registaron, religiojn, kutimojn. Sed Polio komencis invadi kaj subpremi siajn najbarojn, kio kaŭzis serion da militoj. Depost kiam Ukrainio perdis sian politikan sendependecon ĝis la XIV^a jc., la historio de tiu lando estis longa teksaĵo de heroaj luktoj por la libereco. Unuigita en 1559 al Polio, ĝi apartiĝis de ĝi en la XVII^a jc. kaj memvole unuiĝis al Moskvio en 1654, per la traktato de Perejaslav, konkludita de la hetmano Bogdan Ĥmelnicki. Poste, sub la hetmano Petro Doroŝenko, parto de Ukrainio fariĝis dum certa tempo vasala al Turkio, por reveni ankoraŭ al Rusio. La provincoj okcidente de Dnjeper pasis definitive al Rusio nur sub Katerino II^a (1793), kun la divido de Polio, kiam Galicio transiris al Aŭstrio.

Pasinte en 1654 sub la rusan potencon, Ukrainio gardis ĝis la fino de l' XVIII^a jc. aŭtonomion preskaŭ kompletan, superan al tiu de Finnlando (depost 1809) kaj de Polio (de 1815 al 1831). Ĝi restis sendependa respubliko sub ĉefo (hetmano) libere elektata de l' popolo, sed konfirmata de l' caro, rajtis ricevi fremdajn ambasadorojn, posedis sian administron kaj armeon, k. a. Tiu ĉi aŭtonomio, malgraŭ la centralizemaj decidoj de Petro la Granda, estis neniigita nur sub Katerino II^a, kiu ĝin anoncis en manifesto adresita al la „malgrandrusa nacio“, kio elvokis unuanimajn protestojn (1767). La hetmanfunkcio estis neniigita en 1764, la nacia armeo (la Siĉ'o¹) en 1775, la civilaj institutoj en 1781, la presigo de libroj en ukraina lingvo estis malpermesita, kaj la sklaveco estis enkondukita en 1782. La subpremo daŭris ĝis fine Ukrainio perdis sian sendependecon, estis reduktita al stato de rusa provinco kaj perforte rusigata.

La decidoj, kontraŭaj al la liberecoj konsentitaj de la caro al la ukraina nacio en 1654, elvokis multajn ribelojn, el kiuj la plej fama estis tiu de Mazepa. Tiu ĉi eĉ alianciĝis en 1708 kun Karlo XII^a de Svedio, sed post la malvenko ĉe Poltava, li dividis la sorton de l' venkito. Multaj hetmanoj,

¹ La senĉesa militstato kondukis al fondo de l' kozakoj, respublikaj societoj kun elektata ĉefo-hetmano. Loĝante la Siĉ'on, insulo de Dnjeper, sub la rapidfluoj (za porogui, de kie zaporogoj) kaj organizitaj en militdemokratia, spirite grupigitaj, ili rememorigas iom la malnovajn svisojn de l' malgrandaj kantonoj.

kiel Samoiloviĉ, Polubotok, Doroŝenko, finis sian vivon ekzile. La patriotoj turnis siajn rigardojn al Svedio, Turkio, Polio kaj eĉ Prusio, en 1791, epoko dum kiu la marŝalo de la Kieva nobelaro, grafo Vasil Kaĥnist, sekrete prezentis al la ministro Herzberg memorandon pri la perforto de la rusa registaro kontraŭ la ukraina konstitucio. Al la neniigo de la politika aŭtonomio aldonis sin ankaŭ la religia. Kun la falo de Napoleon malaperis la lasta espero de la ukrainoj pri fremda helpo. Rusio ŝajnis nevenkebla. La ukrainaj energioj direktiĝis al la formado de ĝenerala revolucio en Rusio ...

Dum Aŭstrio donis iom da libereco al la ukrainoj, en Rusio mem ĉiu ekprovo de liberiĝo estis rompata. La Peterburgan registaron ĉiam persekutis la timo pri respublikaj sentoj en la lando; ĝi malbenigis ĉiujare en la preĝejoj la nomon Mazepa, kaj en 1876 per ukazo malpermesis la uzon de l' ukraina lingvo. La lernejoj estis fermataj, la muzeoj rabataj, la kolegioj malpermesataj, la teatroj ŝlosataj, la popolo restis en sklaveco ĝis 1862.

Dum la XIX^a jc., la ukrainoj aktive partoprenas en la politikaj kaj revoluciaj konspiroj (ribelo de la decembroistoj, sekreta societo Kiril kaj Metodij, atenco kontraŭ Aleksandro II^a, aktiveco de la ukraina revolucia partio havanta kiel programon sendependan Ukrainion, ribeloj de l' vilaĝanoj, de l' Nigra-mara ŝiparo, k. t. p.). La revolucio de 1905 alportis al la ukrainoj la permeson uzi la ukrainan lingvon, kaj ebligis la elekton unue de 40 deputitoj, poste de 65 en la Duma, sed tiun reprezenton forprenis la balotleĝo de 1907. Nur en la malnova reĝlando Galicio kaj Lodomerio, donita al Aŭstrio ĉe la divido de Polio en 1772, t. e. en la Orienta Galicio kaj en la aŭstraj provincoj de Bukovino, la ukrainoj akiris gravan reprezenton en la leĝdonantaro; ili posedas ĉi tie tre disvolvitan lernejan sistemon kaj sciencajn organizaĵojn. Ĉie la ukrainoj aspiris al nacia unuiĝo en sendependa Ukrainio.

* * *

La oficiala lingvo en Ukrainio, tiu de la eklezio, estis la bulgara, nomata malnovslava aŭ eklezislava, enkondukita de sankta Kiril en la ortodoksa slava mondo, kaj havinta potencon influon je la formiĝo de la skribaj lingvoj rusa

kaj ukraina. La ukraina lingvo, kiu dividiĝas je kelkaj dialektoj, havas, samkiel la bulgara, disvolvon de 1000 jaroj. Iam la ukraina lingvo estis oficiala lingvo ne nur de Kieva kaj Kozaka Ukrainio, sed ankaŭ de Litovio. Laŭ la opinio de la plej aŭtoritataj slavistoj kaj etnografoj (kiel Ŝafarik, Mikloŝiĉ, Lavrovski, Potebnja, Niderle, Ŝahmatov, Korŝ, Fortunatov, k. a.), la ukraina lingvo estas nun memstara lingvo, samranga je ĉiuj aliaj slavaj lingvoj, ĝi uzas la malnovbulgaran alfabeton, kaj ĝiaj gramatikaj kaj leksikaj apartaĵoj estas tiel grandaj, ke sen antaŭa preparo eĉ la ruso ne komprenas ĝin.

Tiu ĉi lingvo sukcesis krei al si jam en la tempo de Nestor la Analskribanto riĉan literaturon, posedas unu el la plej belaj popolaj poezioj, povas sin glori hodiaŭ je belega arta kaj scienca literaturo (historia, filologia, etnografia, ekonomia, politika, k. t. p.), havas sian gazetaron kaj servas kiel spirita ligilo de milionoj. Tial ĝi ne bezonas timi, ke iuj rifuzos al ĝi la rajton sin nomi lingvo.

La ukraina literaturo, kiu komenciĝas jam en la X^a jc., neniam interrompis sian disvolvon. Ĝi povas esti dividata je tri periodoj:

1^e De 988—1158. Plej famaj literaturaj monumentoj de ĉi tiu epoko estas la Analo de Nestor, la Kolekto („Izbornik“) de Svjatoslav kaj la Kanto de Igor („Slovo o polku Igorevi“). Tiu ĉi literaturo estis longtempe transdonata buŝe; estas ankoraŭ *kobzaroj* (publikaj kantistoj), kiuj kantas grandegajn antikvajn poeziaĵojn. En tiu ĉi epoko la malnovukraina literaturo estas sub plej senpera influo de la malnovbulgara.

2^e De 1158—1798. Ukrainio estas sub la regado de Polio. El tio rezultas ankaŭ kelkaj okcidentaj influoj en la literaturo. En tiu ĉi periodo la popola elemento penetras ĉiam pli forte en la skriban parolon. Oni provas traduki la Sanktan Skribon en la popolan lingvon. La ukraina lingvo akiras rajton de civitaneco en la oficialaj dokumentoj de la kozakaj hetmanoj. Post la terura tata invado, Ukrainio estas puŝata al Eŭropo, kaj por la ukraina literaturo malfermiĝas nova epoko. En 1491 estas presita la unua rutena libro, aperinta en Krakovo, kaj la XVI^a jc. plimultiĝas de presejoj. La rutena kulturo triumfas ĝis en Litovio, kaj trovas defendantojn en la pastraro, la frataroj (*Bratstva*) kaj

la kozakoj. Aperas religiaj polemikistoj, el kiuj multaj publikigas slavajn kaj grekajn gramatikojn kaj popularsciencajn verkojn. La plej elokventa inter ili estis monaĥo Ivan Viŝenski, de la Athosa-monto, fervora patrioto. La Kieva Akademio, fondita en 1632 de la metropolito Petro Mohila, estis fokuso de lumo ne nur por Ukrainio, sed ankaŭ por ĉiuj slavortodoksaj landoj, kaj precipe por Moskvo. La teatro komencis ankaŭ aŭdiĝi, kvankam oni ludis precipe misterojn kaj kontraŭpastrajn satirojn. Plej rimarkinda verkisto de tiu ĉi epoko estis la mistika kaj moralista filozofo Skovoroda, amanta la vivon kaj predikanta la altruismon. Sed plej bone kantis kaj gloris siajn heroojn la popolo en sia epika poezio, la t. n. „dumi“ (kantoj). Tio ĉi estas abunda fonto de popola poezio, el kiu ĉerpis ne nur la modernaj ukrainaj poetoj de la XVIII^a kaj XIX^a jc., sed ankaŭ la najbaroj, rusoj kaj poloj. Profesoro Jagiĉ nomas la ukrainan popolan poezion la plej riĉa kaj la plej bela el la slavaj popolaj poezioj, kaj ĝin taksis kun entuziasmo ankaŭ Rambeau, Ralstone, Aleksej Tolstoj k. a.

3^e De 1798 ĝis nun. Tiu ĉi periodo komenciĝas per la fama humora imitado de la Virgilia Eneido de la poeto Ivan Kotljarevski (1769—1808), la restariganto de la ukraina literaturo. Aperinta en Poltava en 1798, kun tiu ĉi poemato komenciĝas la moderna ukraina nacia reviviĝo. La *Eneido* de Kotljarevski estas la unua libro en moderna ukraina lingvo, kaj ĝi prezentas mordantan satiron, kie estas pentrata Rusio kaj ĝiaj intrigoj, burokratio, korupto. Li estis animita de la amo al la popolo kaj de la malamo al la tiraneco kaj al la kruelaj militoj. Al li estas ŝuldataj ankaŭ du ĉarmaj komedioj „Natalka Poltavka“ kaj „La soldato sorĉisto“, kaj „Odo al princo Kurakin“. Tiu ĉi granda talentulo estas prave konsiderata kiel kreanto de la moderna ukraina lingvo, literaturo kaj teatro. Lia nomo restas kiel simbolo de l' nacia vekigo en Ukrainio kiel en Galicio, kaj la rememorigaj festoj je lia honoro estis la kaŭzo de multnombraj patriotaj manifestadoj. La unua rimarkinda poeto, kiu sekvis, estis Petro Artemovski-Hulak (1790—1866), la unua fablisto, doninta bonajn satirojn kiel *Pan ta sobaka* (La sinjoro kaj lia hundo), kaj teatraĵojn. La patro de la ukraina romano, kaj unua realisto, Grigori Kvitka (1778—1843),

sub la pseŭdonimo Osnovjanenko, lasis ĉarmajn novelojn el la popolvivo; lia ĉefa romano estas *Marusia*, legata ankoraŭ hodiaŭ kun emocio. Tipa reprezentanto de la romantismo estas Leon Borovikovski (1811—1889), aŭtoro de multaj baladoj kaj tradukinto de Puŝkin kaj Mickiewicz. Eŭgenio Hrebinka (1812—1848) lasis verajn perlojn per siaj „Proverboj“. Metlinski, Victor Zabillo, M. Petrenko, O. Cubinski, M. Makarovski skribis valorajn poeziaĵojn.

La ukraina literaturo estis en plena florado. La plej bonaj poetoj de la mezo de tiu ĉi epoko estas: la genia Taras Ŝevĉenko (1814—1861), la plej granda kantanto de Ukrainio, la apostolo kaj idolo de la ukraina popolo. Li naskiĝis en vilaĝa dometo kaj konis nur kelkajn jarojn da libereco kaj feliĉo, estante sklavo en sia juneco, kaj politika kaptito en la maturaĝo. En sia frua juneco li montris pentristan talenton, sed flanke de sia metio, li studis la malnovan poezion de sia popolo kaj ekverkis tiel kortuŝajn, tiel superbele karesajn versojn, ke ili rapide disvastiĝis en la tuta lando. Oni ne povas prezenti al si la entuziasmon, kiu salutis ĉiun novan verkon de l' poeto. Li enkorpigis ĉiujn aspirojn, ĉiujn revojn de l' ukrainoj. Lia volumo *Kobzar* (Bardo) — kolekto da lirikaj poeziaĵoj aperinta en 1840 — estas la plej amata libro de la vilaĝanoj, samkiel de la instruitoj; ĉiuj scias parkere ĝiajn inspiritajn versojn. La impresoj de liaj verkoj estas eksterordinara; tuj la juna artisto fariĝis la vera nacia poeto. Neniu, antaŭ li en Ukrainio, parolis pli puran lingvon, priploris per pli veraj larmoj la malfeliĉon de sia patrolando. Lia Muzo estas la Muzo de l' popolo. Estas tuta Ukrainio, rabita kaj enkatenita, konscia pri sia terura sorto, kiu starigas por plendi per lia buŝo. Liaj historiaj poemoj estas tre belaj. Sed liaj „dumi“, signifantaj ukraine samtempe „revoj“ „pensoj“ kaj „kantoj“, restos ĉiam liaj ĉefverkoj; ili forportas lin kaj disŝiras lian koron: „Ne disŝiru min, kantoj miaj, ne bruligu min!“ li krias. Ne estas certe, ĉu ekzistas en la tuta mondliteraturo simila krio de doloro, de mortiga nostalgio. Tiuj ĉi „dumi“, faritaj kun larmoj kaj sango, malgraŭ la kruela malpermeso skribi dum lia ekzilo, povas esti bone traesprimataj per nenia traduko. Lia superbela kaj terura „Testamento“ (Zapovit) fariĝis kvazaŭ dua nacia himno de Ukrainio.

Inter la plej belaj verkoj de Ŝevĉenko ni nomu la kortuŝan poemon *Katerina*, kiu plorigus eĉ la plej sekan koron, *Najmiĉka* (Servantino), la *Hajdamak'oj* kaj *Maria*.

Neniu slava poeto estis pli malfeliĉa, nek pli glora. Ido de l' popolo, li estis la ĉefo adorata de tiu popolo, ĝia diaĵo. Lia nomo estas konata hodiaŭ en ĉiu dometo, kaj lia centjarfesto (en 1914) okazigis patriotajn manifestadojn en ĉiuj urboj de Ukrainio.

Plej rimarkindaj posteuloj de Ŝevĉenko estas: Nikola Kostomarov (1817—1885), historiisto kaj poeto, Panko Kuliŝ (1815—1897), poeto kaj publicisto, Maria Markoviĉ (1834—1907) verkanta sub la pseŭdonimo Marko Vovĉok. Ŝiaj „popolaj rakontoj“ havis brilan sukceson. Ŝi estis por la ukraina romano tio, kio Ŝevĉenko por la poezio. En la epoko de la liberigo de l' sklavo, ĉirkaŭ la supraj algrupiĝas la sekvantaj: Stefan Rudanski (1830—1873), vera poeta talento, viktimo de la lukto inter siaj idealaj kaj patriotaj aspiroj kaj la vivkondiĉoj kaj malaltaj aspiroj de l' ĉirkaŭanta lin societo. Anatol Svidnicki (1834—1872) lasis romanon, kiu pentras la vivon de la „sesdek jaroj“. Leonid Hlibov (1827—1893) estas la tria fablisto, Aleksandro Koniski (1836—1900) arda patrioto. Iom flanke staras Oleksa Storojenko kaj Jakob Ŝĉoholiv, al kiuj sin aldonas P. Kuzmenko, M. Aleksandroviĉ, M. Simonov, St. Nis, Vasil Kulik, Ol. Navrotski, M. Verbicki, V. Aleksandrov, Danilo Mordovec, V. Mova k. a.

La „sesdek jaroj“ estis epoko de liberalismo en Rusio. Kun la emancipo de l' servutoj, la emancipo de l' subpremataj gentoj prepariĝis. La ekzilo kaj la malliberejo havis nur la ĉiaman rezultaton: la ankoraŭ pli fortan renaskiĝon de la nacia animo. Patriotaj aŭ kulturaj societoj „Hromadi“ fondiĝas inter la junularo, la studentoj iras ĉe la popolon . . . , sed subite venis la reakcio.

Neniigita en la rusa, la nacia movado rifuĝas en aŭstran Ukrainion, en Galicion. M. Ŝaŝkieviĉ (1811—1843) el Galicio, O. Fedkoviĉ (1814—1888) el Bukovino, k. a. aŭtoroj estas animitaj de la amo al la popolo kaj de la demokrata ideo. Ili malŝatis la sklavecon kaj la suferojn de la vilaĝanoj, kiujn ili kompatis, kvankam ĉiuj tiuj romanistoj kaj poetoj apartenis al la riĉaj klasoj de l' societo. Malgraŭ

ĉiuj persekutoj, la literaturo daŭris disvolviĝi. De la pli novaj poetoj kaj poetinoj (ili estas multnombraj) notindaj estas: Ivan Franko (1856—1916), la plej granda galicia poeto kaj eble la plej granda ukraina poeto post Ŝevĉenko; scienculo, politikulo kaj pensulo, li estis, kiel tiu ĉi, entuziasma apostolo de la nacia vekigo. Staricki, Levicki, Mirnij estas famaj beletristoj, Marko Kropivnicki kaj J. Tobileviĉ (konata sub la pseŭdonimo Karpenko-Kari), rimarkindaj dramaŭtoroj, Olga Kosaĉ, verkanta sub la pseŭdonimo Olena Pĉilka, prezentas kun multe da aŭtoritato kaj talento la demandon pri kosmopolitismo kaj naciismo kaj ĝin solvas favore je la lasta, Sofia Rusov verkas kaj redaktas rimarkindan gazeton *Svitlo* (Lumo), Bogdan Lepki, valora elegia poeto, Vasil Stefanik, novelisto, M. Kocjubinski, romanisto kun tre granda talento, Larisa Kvitka (filino de Olga Kosaĉ), konata sub la pseŭdonimo Lesja Ukrainka, unu el la plej admirindaj kaj konindaj poetoj de Ukrainio, kiu esprimas al ni la sentojn de sia revema kaj melankolia animo kun tute virina ĉarmo, V. Vinniĉenko, eminenta romanverkisto priskribanta la sociajn luktojn, k. a.

Ukrainio posedas jam de malnova tempo ankaŭ riĉan eklezian kaj laikan arton, ikonopentron, murpentron, ĉiz-, juvelarton, k. a. En tiu rilato Ukrainio estas talenta disĉiplo de Bizanco kaj Bulgario. Ĝi posedas ankaŭ multajn artpentristojn kaj skulptistojn. Kiu ne konas la belecon de la ukrainaj popolaj melodioj, kiujn talentaj komponistoj (Lisenko, Ĉajkovski, k. a.) servigis kaj servigas por siaj simfoniaj kaj operaj komponaĵoj? La ukrainaj popolkantoj estas sendube la plej muzikaj el ĉiuj slavaj kantoj. Famaj estas la ukrainaj gekantistoj.

La ukrainoj povas sin glori ankaŭ je kelkaj unuagradaj scienculoj, kiuj ĝuas bonan reputecon ankaŭ ekster la limoj de sia patrolando: Kostomarov, Antonoviĉ, Dragomanov, Ĵitecki, Ĉubinski, Effimenko, Efremov, Potebnja kaj Hruŝevski (eksprezidanto de la Centra Rada, aŭtoro de naŭvoluma historio de Ukrainio), plej granda historiisto de Ukrainio, kies verkoj estas tradukitaj en multaj eŭropaj lingvoj.

* * *

Superflue estas aldoni, ke ankaŭ la materia kulturo de Ukrainio estas riĉa kaj diversspeca. Ĝis antaŭ nelonge

Ukrajnio estis prave nomata grenujo de Rusio. Ĝia fama nigra tero estas glorata pro sia senkompara fruktodoneco. La areo de kulturata tero ampleksas 45 milionojn da hektaroj, aŭ 53 % de la tuta areo. La jara produktado, kalkulante nur la ĉefproduktojn kiel tritiko, sekalo, aveno, hordeo, atingas 150 milionojn da kvintaloj,¹ t. e. pli ol la trionon de l' tuta rusa produkto. La tuta produkto de grenoj en 1910 estis 215,000,000 kvintaloj, t. e. pli ol 40 % de l' tuta rikolto de Eŭropa Rusio. Ukrajnio kovris preskaŭ la tutan eksporton (9/10) de l'imperio. Inter la komercaĵoj eksportataj en Eŭropon, la nutraĵoj okupas unuan lokon. Inter la mineralsterkoj ni citu la ukrainajn fosfatojn. Fama estas ankaŭ la ukraina sukerindustrio. Tie ekzistas 225 sukerfabrikejoj; la areo de la betkulturo estas 400,000 hektaroj, kaj la produkto en 1910 atingis 50 milionojn da kvintaloj (82 % de l' tuta rikolto de la tiama rusa imperio). Estas 425 alkoholdistilejoj. La tabakkulturo atingas la gravan ciferon da 660,000 kvintaloj (69 % de la tuta rusa produkto); ekzistas 89 fabrikejoj okupiĝantaj pri la tabakpreparo. La produkto de kanabo, lino, sunfloro, lupolo, fruktoj kaj legomoj estas konsiderinda.

La brutbredado floras. Antaŭ la milito, la kvanto de l' brutoj superis 30,000,000 kapojn. Estas venditaj en 1910 pli ol 5 milionoj da birdoj, kaj eksportitaj 600,000 kvintaloj da ovoj, t. e. 40 % de l' tuta rusa eksporto de tiu komercaĵo.

La arbokovrita areo de Ukrajnio egalas 110,000 km², do 13 % de l' tuta areo. Tre grandaj estas la subteraj riĉaĵoj de Ukrajnio: la ferminejoj produktas jare ĉirkaŭ 80,000,000 tunojn kaj la karbminejoj, okupantaj spacon ne malpli grandan ol 24,000 km² kaj produktantaj 20,000,000 tunojn, konsistigas la fonton mem de la tuta industrio de l'imperio. En 1914 la kvanto de la ekstraktita minaĵo altiĝis ĝis 3,245,000 kvintaloj, do unu sesono de l' tuta monda produkto kaj 32 % de l' tuta rusa. Ukrajnio provizas preskaŭ tutan Rusion je salo. Riĉaj estas ankaŭ la petrolfontoj en Galicio.

En edukinstrua rilato Ukrajnio faris ankaŭ tre multe, kaj ni povas esperi, ke la sciencema ukraina popolo, unuigita kaj libera, pasie sin donos al laboro por la bono kaj prospero sia kaj tutmonda.

¹ kvintalo = pezo de 50 kg.

Litovio

Litovio, aperinta post la rusa revolucio sur la politika horizonto, ne estas nova lando, kiel ĝi ŝajnas. Kiel sendependa ŝtato ĝi fondiĝis en la XIII^a jarcento kaj nur en 1795 estis aneksita de Rusio. Ĝia teritorio okupas nuntempe la sekvantajn elementojn de la malnova rusa imperio: la guberniojn de Kovno, Vilno, Suvalki, tutan Grodno, parton de Vitebsk, parteton de Minsk, kaj la nordan parton de la gubernio de Lomza.

Multaj litovoj estas dissemitaj en Kuriando kaj Orienta Prusio. La nomoj de la urboj eĉ ĝis Berlino estas preskaŭ ĉiuj de litova (escepte tiuj de slava) deveno, kio pruvas, ke la lingvo de la malnovaj loĝantoj de tiuj landoj estis la litova, kiun 400 jaroj de persekutoj preskaŭ malaperigis. La tuta teritorio, kies etnografia karaktero litova ne povas esti kontestata, ĉar la ciferoj estas prenitaj el la oficialaj statistikoj, kovras areon da ĉirkaŭ 150,000 km², el kiuj 133,227 troviĝas en rusa Litovio kaj la resto en prusa Litovio. Inter la loĝantoj de tiuj vastaj regionoj 60 % uzas la litovan kiel gepatran lingvon. La ceteraj 40 % dividiĝas proksimume tiel: izraelidoj 12 %, blankrutenoj 9 %, poloj 7 %, germanoj 7 %, rusoj 5 %. La nombro de ĉiuj litovoj atingas la rondan ciferon de 6 milionoj, el kiuj la plimulto loĝas en rusa Litovio, la resto en Prusio, Rusio, Ameriko kaj Anglio.

La litovoj apartenas nek al la slavoj, nek al la germanoj. Ili estas memstara gento — la veraj litovoj kaj latvoj (prusoj, jatvoj k. a. jam pereis). Ili staras plej proksime al la letonoj, frata popolo al ili, kvazaŭ du branĉoj de sama popolo. Laŭ la geografoj ili venas el Irano; ili estus forlasintaj centran Azion puŝataj de la mongoloj, estus pasintaj norde de Kaŭkazo la ebenaĵojn de Don kaj Dnjester, por veni sin lokigi de la bordoj de la Balta-maro ĝis tiuj de Dnjeper-rivero.

En la XII^a jarcento la litovoj estis ankoraŭ dividitaj en triboj havantaj dekduon da ĉefoj, kiuj ludis la rolon de malgrandaj afrikaj reĝoj. Je la fino de la dirita jarcento formiĝas militista klaso, kies ĉefa okupo fariĝis la milito, kio estas unu el la kaŭzoj de la grandeco kaj poste de la falo de la lando. Tiu klaso estis direktata de Mindaŭgis aŭ Mendog, kiu estis kronita reĝo de Litovio en 1252. Lia regado estas rimarkinda pro brilantaj venkoj reunuigintaj ĉiujn litovajn terojn sub lia sceptro. La unua kristanigo de Litovio okazis inter 1200 kaj 1230; centra Litovio fariĝis kristana en 1252 (Mindaŭgis), prusa Litovio inter 1230 kaj 1260, la orienta parto de la lando estis komence influata de l' ortodoksismo, kaj poste la tuta de l' katolikismo. El la krucmilitoj kontraŭ la invado de teŭtonaj kavaliroj kaj tiu de glavportantoj la milito en 1336 estas rimarkinda pro la heroa defendo de la Pillen'a kastelo, ordinara restadejo de fama profetino. Kiam la germanoj penetris en la internan korton, ili estis terurigataj de la spektaklo: la lastaj el la 400 defendantoj gvidataj de Marguier sin mortigis, la kapoj rulis ĉe la piedojn de la pastrino staranta sur konstruita de ili ŝtiparo, kaj fine ŝi mortigis la lastan homon kaj eniĝis glavon en sian sinon. Tiu konduto rememorigas iom la rakontitan de Cezaro malvenkon de la helvetoj en Galio aŭ tiun de sulinoj en la milito por greka sendependeco.

La komerco, la industrio kaj la instruado disvolviĝis sub Gediminas, kiu ĉe sia morto en 1341 lasis grandan kaj potencon Litovion.

La kavaliroj faris, dum la regado de Olguer, en Litovion, 96 invadojn, al kiuj respondis 42 litovaj venĝoj, kaj en 1362 sukcesis detrui la fortikaĵon de Kovno, kie la garnizono komandata de filo de Kejstut preferis morti ĝis la lasta homo ol sin doni. En XVII^a cj. oni ankoraŭ kantis la heroaĵojn de tiu brava trupo. La posteulo de Olguer estis lia ŝatata filo Jagaila aŭ Jagellon, fondinto de la pola dinastio de Jagellonoj. Litovio estis je sia apogeo ĉe Vytautas, kiu nomiĝis granda-duko kaj regis de 1392 ĝis 1430; li vastigis la triumfojn de sia lando, kiu sin etendis de Galicio al la lando de la tataroj. La krucmilitistoj maltrankviligis ĉiam Polion kaj Litovion. Jagellon kaj Vytautas faris ligon, kaj la 5 julio 1410 okazis la fama batalo de Grünwald aŭ

Tannenberg, kiu metis finon al la povo de la germanaj kavaliroj. Ĝi estas unu el la plej decidaj bataloj de la historio. Estis la triumfo de la unuiĝo inter Litovio kaj Polio. Pro novaj eksteraj minacoj, tiu unuiĝo estis plifirmigita en 1569 en Lublin, kiam ambaŭ landoj formis nur regnon, kies reĝo estis elektebla. De tiam la sorto de Litovio miksiĝas kun tiu de Polio. La influo de tiu ĉi estis granda, kaj la politika konkurado neniam ĉesis inter la du aliancanoj. La unuiĝo kun Polio estis do malfeliĉa por Litovio, kies nobelaro, imitante la nobelojn polajn, malatentis ĉiun alian intereson ol la sian. Ĝi monopoligis ĉiujn artiklojn de la ĉiutaga vivo por siaj vilaĝanaj regatoj, donante kelkfoje kontraŭ alta prezo tiujn monopolojn al hebreoj. Ĝi grandigis siajn rajtojn, ekspluatis kaj ruinigis la popolon. La anarkio estis plej granda sub la regado de Aŭgusto de Saksio (1733—1763). Tiel do la dividoj de la XVIII^a jc. ĝin trovis en la brakoj de Polio. Post la lasta divido de tiu ĉi en 1795, Litovio kaj Polio malaperis kiel sendependaj ŝtatoj. En 1870 la rusa registaro elviŝis eĉ la nomon de Litovio sur la karto de Eŭropo. La Vilna universitato, unu el la gloroj de Litovio, fondita en 1579, estis fermata en 1831. La poligado de antaŭ 1863 nun estis anstataŭata de rusigado.

Vere, la plej malfacila situacio por nacio estas sin trovi dismembrita inter kelkaj ŝtatoj, submetita al aliaj. Tiel la litovoj estis malrapide dismembritaj ne unufoje de Rusio, Prusio, kaj ĉiuj provoj, kiujn ili faris por reakiri sian sendependecon, rompiĝis kontraŭ la pli granda forto de la reganta nacio, kio ankoraŭ plimalfaciligis ilian situacion.

Post la anekso al Rusio, komenciĝis por la litova nacio malluma epoko: ĝia tuta vivo religia, socia, kultura kaj politika estis konstante objekto de severaj persekutoj. Malgraŭ tio, ĝi ne ĉesis postuli sian sendependecon, eĉ kun armiloj en la mano, en 1830, 1863, 1905.

Oni ne devas forgesi, ke ĝis 1905 ĉiuj instruistoj, oficistoj, eĉ la skribistoj de la komunumestroj devis esti rusoj. La plej granda malfeliĉo estis la malpermeso presigi librojn en litova lingvo. Tiel la popolo estis devigata liverigi al si kontrabande presaĵojn en sia lingvo el Tilsit (Prusio). Tiuj volumoj pasis de mano en manon kaj vekis la nacian kons-



cion. En 1883 aperis en Tilsit la unua litova ĵurnalo *Auszra* (Aŭroro), kiu celis konigi al la litovoj iliajn rajtojn kaj ilian naciecon, amigi la landon kaj postuli la liberecon de la lingvo. Tiu ĵurnalo, predikanta la nacian renaskiĝon, havis grandan influon. En 1889 ĝi estis anstataŭata de la *Varpas* (Sonorilo) kun pli radikala koloro. En 1902 fondiĝis la litova demokrata partio; la pli kleraj naciistoj fondis en 1905 la nacian partion de litovaj demokratoj, kies programo insistis precipe pri la libereco de la litova lingvo.

* * *

La litova lingvo estas tute malsimila al la pola aŭ aliaj slava lingvoj; la diferenco inter ĝi kaj ili estas tia, kia inter la germana kaj la novlatinaj lingvoj. La litova estas sendube la plej malnova ĝis nun vivanta lingvo de la aria raso — unua branĉo de la sanskrito. La fama lingvisto Max Müller diris: „Kiam mi aŭdas iun paroli litove, mi sentas min transportata en tiun tempon kaj regionon, kie staris la lulilo de la aria raso.“ Apogante sin je la etimologio oni povas diri, ke multaj nomoj de landoj, maroj kaj riveroj devenas de la litova lingvo, ekz. Balkanoj el „Baltkainai“ = blankaj montoj, Britio el „brist“ = vadi, Baltiko el „Baltjure“, aŭ „baltmare“ = blanka maro, Elbo = Labo el la litova „laba“ = bona k. t. p. La litova lingvo estas sufiĉe belsona kaj tre riĉa, sed ne tre facila, pro la komplikaj akcento kaj ortografio, la multkaza deklinacio kaj pro la granda nombro da esprimoj ne konataj en multaj lingvoj. Ekz. por esprimi „nutri“ la litovoj havas preskaŭ dek diversajn esprimojn (alia por ĉiu vivanta estaĵo). En litova oni trovas la vortojn por esprimi tiajn ideojn, kiajn oni vane serĉus en multaj vivantaj aŭ eĉ mortintaj lingvoj, ekz. „žmona“ = homino. La litova, samkiel ĉiu natura lingvo, havas ankaŭ kelkajn dialektojn, el kiuj rimarkindaj estas la „ĵemajta“ kaj la „dzuka“. La litovoj uzas la latinan alfabeton; nur malmultaj el ili (luteranoj loĝantaj en Prusio) uzas la gotikan, sed ili sur- kaj submetas signetojn pro sia originala elparolo de multaj literoj.

Kiel ĉie ankaŭ ĉi tie la parola literaturo antaŭiris la skriban. La litovoj havis multajn heroajn kantojn kaj poemojn valorajn por la tutmonda literaturo, sed bedaŭrinde

la persekutoj de la pastraro malaperigis ilin. Nun la litova popolo ne kantas plu la batalojn, ĝi ploras la mortintojn; ĝiajn poeziaĵojn oni nomas „*rauda*“. Alia speco de poeziaĵoj ŝatataj de la popolo estas la „*dainoj*“, lirikaj popolkantoj akompanataj de melodioj, kie la gamoj estas tute diferencaj de tiuj de nia muziko. La „*dainoj*“ montras la ĉastan kaj delikatan karakteron de la popola spirito. La filologo Rhesa dum dektrijara serĉado inter la popolo trovis neniun amkanton maldelikatan; ĉiuj estas puraj.

Je la fino de l'XVI^a jc., la ideoj de la Reformo penetris en Litovion jam katolikiĝintan; la luktoj de l'katolikoj kontraŭ la protestantoj naskis religian literaturon en litova lingvo.

La plej malnovaj verkoj litove presitaj estas do religiaj traktatoj, kateĥismoj, evangelioj. La skriba literaturo estis enkondukita en la popolon precipe de la protestanta eklezio. Malgraŭ la senĉesaj luktoj, la intelekta vivo de la lando ne estis malatentata. Estis multaj verkistoj, kiuj subtenis la nacian konscion per litova literaturo. La unua, kiu starigis la demandon pri la nacieco kaj pri la graveco de la nacia lingvo, estas Daukša, tradukinto de katolika kateĥismo; li diris, ke provi forigi la lingvon al iu popolo, estas provi forigi la sunon, detrui la ordon de l'universo, neniigi la vivon. Damil Klein (1653) publikigis litovan gramatikon, kaj pastro Konstantin Schirwid (1564—1631) vortaron. La traduko de la Nova Testamento en 1701 estis la elirpunkto de nova literatura epoko en la XVIII^a jc., epoko kiun oni nomas kelkfoje jarcento de Duonelaitis (1714—1780), aŭtoro de *Metas* (sezonoj), nacia epopeo skribita en heksametroj kaj priskribanta la litovajn morojn kaj kutimojn, ĉefa monumento de la litova literaturo. De post 1701 la literaturo disvastiĝas; ĝis 1891 oni publikigis ĉ. 1200 librojn, ĵurnalojn kaj broŝurojn. Antaŭ la nuna milito estis publikigataj 76 litovaj gazetoj, el kiuj 42 en Rusio, 9 en Prusio, 23 en Ameriko kaj 2 en Skotlando.

Se A. Mickiewicz, granda pola-litova poeto, verkis pole, liaj samtempuloj Poŝka, S. Daukantas kaj ĉefpastro Valanĉius uzis la litovan lingvon en siaj verkoj. Ili estas la tri grandaj antaŭuloj de la nacia renaskiĝo de Litovio (kies patro estas Jean Bassanavitsius). La litova literaturo konsiderinde ekvastiĝis en la unua duono de l'XIX^a jc., kiam

ĝia disvolvo estis subite haltigita de l'rusa registaro. Malgraŭ la nenormalaj kondiĉoj, dum la periodo de malpermeso (1864—1904) ĝi akiris multajn verkojn utilajn al la popolo, poeziaĵojn, dramojn, novelojn. Plej rimarkindaj poetoj de tiu epoko estas Maironis, Sekupasaka (Vaiĉaitis), Baranovskis, kelkaj el kies lirikaĵoj estas fariĝintaj tre popularaj kaj kies poemo *Anykszcziu Szilelis* (Anykŝĉiua arbaro) estas vera ĉefverko de la litova nacia epopeo. La eminenta publicisto V. Kudirka okupas tute apartan lokon en la nuntempa litova literaturo, al kiu li adaptis multajn ĉefverkojn de la germana kaj angla literaturo. Lia plej rimarkinda verko *Tevynes Varpai* (Sonoriloj de la patrolando) donas tiel veran kiel pitoreskan bildon de la renaskiĝo de Litovio. Li estas ankaŭ la aŭtoro de la nacia himno *Lietuva tevyne musu* (Litovio nia patrolando). Inter la nuntempuloj unua loko apartenas al la granda dramaŭtoro Vidunas, kies plej bela verko estas la trilogio *Probotsziu Szeszeliai* (Ombroj de la praavoj), poste Jaksztas, talenta poeto kaj publicisto, Vincas Kreve, rakontisto, Liuda Gira, lirikisto, J. Dobilas kun sia rimarkinda psikologia romano *Bludas*, Zemkalnis, verkinto de l'teatraĵo *Blinda*, k. a. La virinoj ne restis malantaŭe; inter ili estas romanistinoj, kiuj ne cedas al la francaj aŭ anglaj verkistinoj, ekz. Zemaite, Szatrijos-Ragana, Lazdynu Peleda, Bite-Petkevicz. Kvankam ĝi ne ankoraŭ produktis multe da verkoj de unua vico, la litova literaturo komencas ankaŭ florigi rimarkindajn talentojn, kaj kiam la popolo estos pli klera, ĝi povos ankaŭ krei geniojn, kiuj, en libera Litovio, kiam la detruoj de la milito estos riparitaj kaj la loĝantaro reakiros iom da bonstato, povos porti malproksimen la nomon kaj la gloron de Litovio.

* * *

Litovio estas malvarma kaj ebena lando, konsistanta precipe el arbaroj kaj herbejoj. La lando estas ĉefe agrikultura; oni kulturas tie sekalon, hordeon, aromon de poligono, kaj tritikon. Grandegaj arbaroj estas ekspluatataj. Oni eksportas ĉiuspecajn grenojn, ĉevalojn, peltojn, ĉasaĵon; oni eksportas ankaŭ mielon, ledon, lanon. En Vilno kaj Grodno ekzistas tanejoj, vitraĵejoj. La agrikulturo povas havigi nutraĵon al la okcidenta Eŭropo; sed la industrio ne estas ankoraŭ sufiĉe progresinta.

La ĉefa demando nun estas pri aŭtonomio de Litovio. La litovoj estas tiom suferintaj de siaj najbaroj, ke oni komprenas ilian deziron al sendependa regno. Ili esperas akiri tiun sendependecon estante pretaj sin organizi respublike, kaj poste partopreni en la Ligo de l' Nacioj. Helpota de sia respublika konstitucio, la litova popolo povos libere kulturi sian lingvon, fondi lernejojn, progresi en la artoj, la komerco kaj la industrio.

Ĝi estas forta, rezista, kaj kuraĝa nacio, kaj posedas bone difinitan teritorion sufiĉan por certigi ĝian disvolvon. Ĝi manifestas bone difinitan kolektivian volon, regule organizatan per la litova Dieta en Vilno (ĉefurbo) sub la supera aŭtoritato nomata *Taryba*, laŭleĝa organo de la litova ŝtato kaj popolo, elektita de la reprezentantoj de tuta Litovio la 17—23 septembro 1917 kaj rekonita unuanime de ĉiuj litovoj eksterlande (en Eŭropo kaj Ameriko). Ĝia oficiala organo estas la gazeto „Lietuva“. La „Taryba„ kalkulas inter siaj membroj la plej eminentajn homojn de ĉiuj partioj kaj de ĉiuj klasoj de la litova popolo.

La historio de Litovio samkiel la ĝenerala demokrata evoluo donas al ĝi la rajton refariĝi sendependa ŝtato; por tio klopodas ĉiuj litovaj politikaj partioj. Estas multaj ŝancoj, ke Litovio fariĝos post la milito intermedia kaj memstara ŝtato. Ĝia sendependeco ja estis lastatempe proklamita de la Dieta en Vilno kaj rekonita de kelkaj regnoj. Estas certe, ke la formiĝo de tiaj ŝtatoj havos grandan intereson nacian por Eŭropo, kies ordonvorto por la estonteco devos esti: unuiĝo de demokrataj kaj liberaj popoloj.

Blankrutenio

La teritorio loĝata de la blankrutenoj aŭ blankrusoj limas okcidente kun Letonio, Litovio kaj Polio, sude kun Ukrainio, oriente kaj norde kun Grandrusio. Interne de tiuj limoj loĝas en kompakta maso ĉirkaŭ 5 milionoj da blankrutenoj.

Laŭ Kareki la apartenaĵo de la blankrutena lingvo etendiĝas sude ĝis rivero Pripjet, okcidente ĝis Bug, ĉe la fontoj de Narev kaj de Bobr, ĝis la kunfluiĝejo de Vilza, norde ĝi forpasas Duna, ĝis la rivero Lovat, oriente ĝis la fontoj de Volga kaj ĝis la supraj enfluantoj de Dnjeper. Tiamaniere oni povas atribui al Blankrutenio la guberniojn de Minsk, Grodno, sen la sudaj partoj, malgrandan parton de la gubernio de Suvalki, la gubernion de Vilno escepte la nord-okcidentan angulon, preskaŭ la tutan gubernion de Vitebsk, la tutan de Mohilev, la okcidentan parton de tiu de Smolensk kaj malgrandan parton de tiu de Ĉernigov.

La historiistoj pensas, ke la blankrutenoj estas idoj de la malnovaj *vendoj* loĝintaj ĉe la bordoj de Danubo, kaj kiuj en la unua jarcento p. K. estus venintaj loksidiĝi en la landoj trafluataj de Duna, Vistulo kaj Volĥov. La blankrutenoj devenas de la malnovaj slavaj triboj *kriviĉi* kaj *drehoviĉi* (de drehovi = marĉoj), organizitaj ĝis la IX^a jarcento en unueca ŝtato de la gotaj legioj venintaj el Skandinavio.

De la IX^a ĝis la XIII^a jarcento la historio de Blankrutenio estas nur sekvo de furiozaj militoj por la defendo de ĝia sendependeco kontraŭ la resto de Rusrutenio (Ŝtato de Kiev, de Novgorod, k. t. p.). Fine la princlandoj Kriviĉ (Blankrutenoj) estis grade konkeritaj de Litovio, de la XIII^a jc. ĝis la dua duono de XV^a jc.; la blankrutenoj estis aneksitaj de la litovoj en ilia potenca ŝtato konata en la historio sub la nomo de grandduklando Litovio. En la fino de la XVIII^a jc. la polo-litovo-rutena respubliko estis dispartigita inter la najbaraj ŝtatoj: Prusio, Aŭstrio kaj Rusio.

Blankrutenio estis aneksita al Rusio en 1793, per akordo subskribita en Grodno de la imperiestrino Katerino II^a. Ŝi promesis konservi por ĉiam la liberecon de penso, la netuŝeblecon de la bienoj pastraraj kaj publikaj kaj la civilan liberecon, laŭ la malnovaj kutimoj. Sed malfeliĉe ŝia kaŝita intenco estis ne teni la promesojn kaj rusigi iom post iom la landon.

Dum la sekvanta jaro komenciĝis persekutoj kaj limigoj kontraŭ la rutenoj. Interalie oni malpermesis presi en la landa lingvo la Sanktajn Skribojn kaj religiajn librojn. La persekutoj kontraŭ la nacia uniata eklezio multiĝis; la preĝejoj estis konfiskataj, la monaĥejoj fermataj, la preĝlibroj bruligataj, la uniataj pastroj kondamnataj, la fideluloj konvertataj perforte al la ortodokseco.

La blankrutena popolo rezistis al tiu deviga unuigo al la ortodoksa Eklezio; per armita forto kaj punekspedicioj plenumitaj de la rusaj kozakoj, oni predikis la enkondukon de la ortodokseco en Blankrutenio. La procedo de la kunigo de la uniatoj al la oficiala eklezio daŭris de 1820 ĝis 1905. La sango de la martiroj de la „unuigitaj per amo“ ruĝigis la teritorion de la blankrutenoj kaj la neĝojn de Siberio. La transformo de la uniataj preĝejoj estis akompanata de sangaj bataloj. Samtempe, por rusigi la blankrutenojn, la rusa registaro plenigis la landon je Moskvanaj oficistoj kaj popoj, al kiuj, ĝis la revolucio de 1917, la sinodo pagis duoblan salajron kiel al misiistoj. La nombro de la lernejoj depost 1840 estis reduktita je kvarono. La servuteco de la vilaĝanoj estis aparte fortigita en Blankrutenio. Severa regado, severa cenzuro. De 1793 ĝis 1805 oni trovas nenian alian publikigaĵon en blankrutena lingvo ol du kateĥismojn. Nur en 1905 la blankrutenoj, same kiel la aliaj naciecoj, akiris la rajton presigi kion ajn en sia lingvo.

* * *

La blankrutenaj vilaĝoj de la gubernio de Vitebsk neniel diferencas de tiuj de la aliaj gubernioj loĝataj de tiu ĉi nacieco. La vilaĝana domo estas malgranda, fumplena, senaera; ĝi estas konstruita per lignaj ŝtupoj, kovrita per ŝindoj sennajlaj aŭ per pajla tegmento, truita de unu aŭ du fenestretoj el vitropeco; odoro de homaj korpoj kaj de dombestoj

pikas la nazon, kiam oni eniras en la ĉambron de la loĝejo, kiu somere estas plena je muŝoj kaj aliaj insektoj. Tiuj ĉi isba'oj aspektas malriĉe, mizere. Unu vilaĝo konsistas el dekduo da tiaj isba'oj. La vilaĝoj estas dissemnitaj inter la arbaroj kaj la marĉoj, ofte en lokoj kien apenaŭ povas alveni malriĉaj veturiloj formitaj per kvar radetoj el kverko aŭ betulo, sen fergarnaĵo, kaj per tabuloj kuŝantaj sur la traboj, kiuj servas kiel aksoj. Vintre, la glitveturiloj estas neniel pli oportunaj. La ĉevaloj — kies jungilo konsistas ofte nur el ŝnuroj — kaj la bovinoj estas nek grandaj nek fortaj. Ĝenerale la monstato de la blankruteno estas malĝoja. Li plugas sian teron per tre antikvaforma ligna plugilo; li alprenis neniun el la modernaj metodoj. Dank' al tio, liaj rikoltoj estas malriĉaj, kvankam lia tero, se ĝi estus science kulturita, povus produkti du-triole pli; li laboras multe, sed la rezulto de liaj laboroj estas kompatinda.

Laŭ etnologia vidpunkto, la blankruteno diferencas de la grandruso kaj de la ukraino. Liaj haroj estas flavruĝaj, la okuloj iom malfermitaj, iomete enŝovitaj, grizaj; la vizaĝo estas ronda. Je 40 aŭ 50 jaroj li aspektas maljuna; la virinoj maljuniĝas rapide, sed en la juneco ili estas sufiĉe beletaj kaj allogaj. La vestoj de la vilaĝanoj estas tre simplaj, sole la kapvestoj de la geviroj varias. Dum ĉe la grandrusoj la preferata koloro estas la ruĝa, tiu de la blankrutenoj estas la blanka; blanka kitelo, blanka ĉemizo, blankaj pantalonoj kun tola ĉirkaŭzono; ĉe la virinoj la jupo, la antaŭtuko, la kaptuko estas blankaj, somere kaj vintre, labor-kaj festotage. Kiel kapveston la viroj havas drapan aŭ ledan kasketon, aliaj havas altan ĉapon sen randoj aŭ kun randoj realigitaj; aliaj havas ĉapojn el pelto, el ŝafleto; kelkaj havas kvadratajn ĉapojn laŭ pola formo. La virina kapvesto estas ofte semita je floroj aŭ brodaĵoj.

La nutraĵo estas plej simpla: somere lakto, kazeo, aŭtune terpomoj kaj vintre betoj, fazeoloj, brasikoj, pizoj, herbsupo, sekalpano, malbone bakita, farita el faruno kaj brano de sekalo muelita en la familioj per mueliloj antikvaformaj.

La grandparto de la blankrutenoj sin dediĉas al la agrikulturo (76 %), sed ili posedas nur 47 % de la tero, kaj multaj terkulturistoj ne havas sufiĉe da grundo por nutri sian familion.

La hejma industrio estas tre malmulte kreskinta en la lando. La fabrikejoj ankaŭ okupas nur kelkajn dekmilojn da laboristoj kaj produktas de 70 ĝis 80 milionoj da rubloj, kaj tamen la proksimeco de la riveroj Njeman kaj Duna devus favori la eksporton. Depost 1905 oni vidis tre rimarkindan vekigon de la nacia sento, kiu progresigis ankaŭ la industrion kaj agrikulturon. La vilaĝanoj komencas kompreni la gravecon de la rusa vendejo. Oni povas esperi, ke la progreso daŭros post la milito, kaj ke la lando ruinigita de la invado kovriĝos rapide per prosperaj vilaĝoj.

* * *

Kvankam la blankrutena lingvo apartenas al la slava grupo, malĝuste estas ĝin rigardi kiel simplan rusan dialekton. La unua impulso al la blankrutena kulturo estas donita de la Renesanco, en la komenco de la XVI^a jc., sed jam antaŭe oni uzis la popolan lingvon en la tribunaloj; la leĝoj estis skribitaj en tiu idiomo, kiu estis parolata ankaŭ en la kortego de la grandduko de Litovio, sed depost la mezo de tiu jarcento oni vidas rapidan disvolvon de la instruado kaj de la literaturo, oni fondas preĝejojn, lernejon de leĝoscienco, superajn lernejojn, kie oni instruis kvin lingvojn, la Akademion de Polotzk.

La unua distinginda nomo en la literaturo estas Francisko Skorina, tradukinto de la Biblio. Depost 1540 la kultura movado plivastiĝas; oni publikigas en la urboj religiajn, polemikajn, apologiajn, pedagogiajn librojn, tradukojn de malnovaj francaj poemoj, k. t. p. La artoj ne restis malantaŭe.

Tiun brilantan epokon sekvis dekadenco. La pola lingvo substituiĝas iom post iom al la blankrutena. Al tiu altrudita poligado oni atribuas la preskaŭ kompletan malaperon de blankrutene presitaj libroj en tiu epoko. Tamen, la vilaĝanoj daŭrigis paroli la lingvon de siaj prapatroj. La sklaveco enkondukita de la poloj havis ankaŭ pereigan efikon je la kulturo. La uniataj pastroj protektis la lingvon de siaj paroĥanoj; ili publikigis kateĥismojn, religiajn kantlibrojn. Tiel, en 1774 aperas la kolekto *Kantyczka*, kaj inter 1771 kaj 1792 oni trovas verkojn kiel *Radujsia Bozy narodzie* (La Diaj popoloj ĝojas), *Nova radasc stalla* (Nova ĝojo

venis), *Caru Chrystie mily* (Amitaj de la Sinjoro), k. t. p. Je la fino de la XVIII^a jc. oni publikigas grandan nombron da politikaj skribaĵoj, pamfletoj, satiroj, komedioj, verkoj por profesoroj kaj pastroj. La ideoj de la franca revolucio penetris ĝis la popolo kaj havis adeptojn. Oni eksentis nacian vekigon kaj postulis la liberigon de la sklavoj. La aŭtoroj komencis studi la rutenan popolon, publikigi priskribojn de la lando, kolekti el la buŝo de la popolanoj kantojn kaj legendojn, sed pro la tro severa cenzuro la verkoj devis aperi fremdlande.

Inter la plej rimarkindaj aŭtoroj de tiu ĉi epoko oni devas citi Jan Ĉeĉot, amiko de Mickievicz, sendita en 1823 en Siberion pro konspiro; reveninte en 1844 li publikigis *Piosnki wieśniacze* (Printempaj rimoj), poemkolekto havinta grandan sukceson.

En 1846 aperis teatraĵo nomita *Sielanka* (Vilaĝanino), de Dunina Martzinkeviĉ, duone en pola, duone en blankrutena, por trompi la cenzuron. La fama pola muzikisto Monuszko verkis la muzikon de „Sielanka“, kaj tiu ĉi verko estis ofte prezentata. Pro la persekutoj kontraŭ la blankrutena lingvo, granda nombro da verkistoj, kiel Kirkor, Voul, Korotkeviĉ, Liaskovski, Mroček, k. a. devis rondirigi siajn verkojn kiel manuskriptojn. Dum la pola ribelo en 1863 la blankrutenoj ĝuis iom pli da libereco.

Malgraŭ la jugo, kiu dum cent jaroj pezis sur la nacia sento, je la apero de la unua blankrutena ĵurnalo, amaso da konsciaj rutenoj respondis al ĝia alvoko. Rutena ĵurnalo aperis en Bjelostoko sub la nomo *Hutorka*, sed la registaro tuj malpermesis ĝin, same kiel ĉiun libron en blankrutena, escepte etnografiajn traktatojn. La prezentadoj en la landa lingvo estis ankaŭ malpermesataj. Estis intelekta morto. Tamen Hilferding, Dmitriev, Bezçonov, Scheun, Dombovetzki, Romanov, k. a. aperigis kolektojn de poemoj kaj rakontoj popularaj.

Komence de 1880, rimarkiĝas socialista movado. Oni kaŝe presigas broŝurojn kun tendencoj klare revoluciemaj en la okuloj de la caristaj aŭtoritatoj. La ĵurnalo *Homan*, kiu aperis malkaŝe en Vilno en du eldonoj, unu en Kirila alfabeto, alia en latina, estis presata komence de 1891 en la keloj. Kiam oni volis presigi ion, oni devis kredigi

al la malkleraj cenzuristoj, ke ĝi estas bulgara aŭ serba lingvo.

La registaraj persekutoj ne povis malhelpi la vekigon de la nacia konscio. Estis fondita blankrutena revolucia Unuiĝo, kiu nomiĝis pli malfrue socialista blankrutena *Hromada* (asocio). Ĝi presigis propagandajn broŝurojn. Ĝiaj membroj volis enkonduki en la lando la politikan kaj socialan progreson kaj postulis tuj larĝan aŭtonomion.

Dum la revolucio de 1905 estis ĉie en la lando rimarkinda intelekta movado; oni fervore legis la ĵurnalojn kaj broŝurojn, sed la reakcio ree triumfis, kaj jam en 1906 oni malpermesis la ĵurnalon *Nasa Dolia* (Nia sorto), kiu estis la unua ĵurnalo publikigata laŭleĝe. En Vilno aperis tre modera ĵurnalo *Nasa Niva* (Nia rikolto), kiu unuigis la plej bonajn verkistojn kaj disvastigis en la tuta lando la amon al la nacia lingvo kaj la deziron al la libereco. Talentaj poetoj kiel Kaĝants, Krapink, Builo, A. Pavloviĉ, Budzika kaj aliaj povos famigi la rutenan poezion, kiam la lando ĝuos veran aŭtonomion.

La unua nominda prozisto, talenta romanisto, estas Jadvigin. Liaj verkoj, publikigitaj en 1909, 1912, 1914 enhavas precipe prozfablojn, en kiuj emocio miksiĝas kun humoro. Vlasta estas vere originala en siaj kortuŝaj noveloj, priskribante la malfeliĉan sorton de siaj samlandanoj, ilian idealon de justeco kaj egaleco ĉiam sufokatan de la kruda batalo por la ekzisto. F. Gushta publikigis depost 1912 serion da rakontoj formantaj kvin volumojn; li scias tuŝi la sentemon de la vilaĝano, priskribante la simplan kaj ofte mizeran vivon de la blankruteno. Tendenco ofte pesimista karakterizas ankaŭ la romanojn de Biadula. Inter la aliaj nuntempaj romanverkistoj ni povas nomi Novitek, Lencik, Jivitza. Krom tiuj verkistoj oni trovas tutan serion da historiistoj, kritikistoj, poligrafoj, kiuj montras la mirigan disvolvon, kiun en dekduo da jaroj povas atingi la literaturo de subpremita popolo tuj kiam la katenoj estas rompita. Kun la libereco venos ankoraŭ pli rapidaj progresoj, ekonomiaj, financaj, industriaj, artaj kaj literatura. Nun la blankrutena popolo volas ne nur konservi sian apartan karakteron, siajn instituciojn, sian lingvon, sed sian nacian konscion; ĝi volas formi aŭtonoman tuton, liberan ŝtaton en la rusa federio.

Letonio

Unu el la plej interesaj kaj plej multsuferintaj de la militteruraĵoj, apudbaltaj landoj de la malnova rusa imperio estas nediskuteble Letonio. Ĝia teritorio okupanta la nord-okcidentan parton de Rusio konsistas el Kurlando, la pli granda parto de Livlando kaj de Letgalio aŭ Inflantio t. e. la tri nordaj cerkloj de la provinco de Vitebsk, kaj el parto de la gubernio de Kovno. Ĝia surfaco de 63,318,6 km² (Kurlando 27,042,9, Livlando 22,570,9, Letgalio 13,704,8 km²) estas notinde pli granda ol Belgio, Danio, Svisio. Ankaŭ rilate la nombron de sia loĝantaro — 2,554,000 — Letonio povas figuri apud Norvegio, Danio, Finnlando. La letonoj formas en la kamparo 94,5 % de la tuta loĝantaro; la resto estas partigita inter germanoj, rusoj, hebreoj, litovoj, poloj, estonoj kaj aliaj.

La letonoj apartenas al etnologia kaj lingva branĉo, kiu havas nur du reprezentantojn, la letonan kaj la litovan (la malnova prusa, kiu apartenis al la sama familio, tute malaperis). Oni tute ne devas ilin miksi kun la slavoj.

Ne estas sciate precize, en kiu epoko la letonoj, samkiel la litovoj, invadis la landon nun okupatan de ili. Oni scias, ke ili venas de la altaj ebenaĵoj de Irano, sed ilia migrado, se oni juĝas laŭ la perfekteco de la gramatikaj formoj, devus esti pli novtempa, ol tiu de la aliaj ariaj rasoj, ĉar ilia lingvo, unu el la plej dolĉaj kaj plej melodiaj de Eŭropo, estis nur malmulte influita de la barbaroj, kiuj invadis la roman imperion. La lingvoj de tiuj ĉi transformiĝis kaj simpliĝis iom post iom, dum malgraŭ la sennombraj persekutoj, kiujn la letonoj kaj litovoj suferis, ili konservis riĉecon de formoj kaj de finiĝoj, kiujn la keltaj, romanaj kaj germanaj lingvoj perdis.

La letonoj trovis la bordojn de la Balta-mar-o okupataj de raso nomita livo, pri kiu oni scias preskaŭ nenion. Verŝajne

ĝi estas absorbata de la novevenintoj, ĉar en perditaj anguloj de la baltaj provincoj ekzistas ankoraŭ idoj de pli antikva raso multe pli malsupera al la letonoj.

La ariaj enmigrintoj, post sia establiĝo ĉe la bordoj de la Dvina-rivero kaj de la Finnlanda-golfo, kondukis pacan vivon, fiŝkaptante, bredante bestojn, kaj pensante neniam al milito. Estis popolo milda kaj amema, vivanta verŝajne komunume kiel oni povas ĝin distingi en la antikvaj kantoj, kiuj formas la plej valoran trezoron de la literaturo de tiu popolo. Ili estis tiel bonaj kaj konfidemaj, ke ili akceptis kun malfermitaj brakoj la germanajn negocistojn de Lübeck, kiuj en 1150 vizitis unuafoje tiujn randojn. Serĉante novajn vendejojn en Oriento, ili haltis ĉe la enfluejo de Dvina kaj tie sin instalas. Tiu ĉi unua vojaĝo estis la antaŭkuranto de pli grandaj malfeliĉoj, kiujn suferis tiuj ĝis tiam tiel feliĉaj kvankam malriĉaj landoj.

La profitaj interŝanĝoj, kiujn sciis fari la unuaj marvojaĝantoj, altiris novajn komercistojn. Tiuj ĉi estis sekvataj de monaĥoj, kiuj supreniris Dvinan. Ili estis armitaj per lancoj kaj glavoj, ĵetis sin sur la *Kurojn* (branĉo de la letona popolo), kiuj loĝis apud la maro, ĉe la bordoj de l'rivero, kaj havis por defendo nur hakilojn de siliko kaj bronzo. La resto de la letona raso, vidinte la terurajn buĉojn de siaj fratoj, submetiĝis al Meinhard, ĉefo de la monaĥoj, kiu estis nomita episkopo. Ĉe liaj posteuloj Albert kaj Torquemada, la lando estis trabanita en sango, precipe post la fondo de la ordeno de livlandaj kavaliroj aŭ glavportantoj, al kiuj la papo konsentis la rajton regi la novekonvertitojn.

Tiu ĉi stato daŭris jarcentojn kaj estis interrompata nur per la oftaj ribeloj de la subpremataj vilaĝanoj, kiuj estis sufokataj en sango. La glavportantaj kavaliroj estis ne nur monaĥa ordeno sed konkerantoj, kiuj prenis la titolon de baronoj kaj sin instalas en kasteloj, meze de la teroj apartenantaj al la ordeno. Ili ne interkomprenis sin, kaj okazis militoj de kastelo kontraŭ kastelo, de urbo kontraŭ urbo. Estis epoko de anarĥio, pro kiu suferis, kiel ordinare, precipe la kompatindaj vilaĝanoj.

Kiam en 1410 la sorto de la teŭtonaj kavaliroj decidiĝis apud Tannenberg, malfacilaj tempoj komenciĝis por la livlanda ordeno. Pasis unu jarcento en senĉesaj bataloj kontraŭ la

letonoj, poloj kaj rusoj. Sed en 1502 la Moskvanoj invadis Livlandon. La alvoko de la balta ordeno al Germanio restis senresponda; tiam la lasta superulo de l'ordeno, Gothard Kettler, sin turnis al la poloj. Sigismund-Aŭgusto, kiu regis en Polio, ricevis siaparte sudan Livlandon; Kettler estis nomata duko de Kurlando, sub la estreco de Polio. Norda Livlando, t. e. nuna Estonio, pasis al Svedio. Tio ĉi estis nova fonto de malpaco inter Polio kaj Svedio, kiuj kondukis furiozan militon. Ĝi finiĝis nur en 1629, kiam Gustavo Adolfo akiris Livlandon kaj Estonion; Kurlando restis pola feŭdalŝtato. De tiam datumas la enkonduko de la reformo en la baltaj provincoj. En 1652 la livlanda ordenŝtato disiĝis.

Svedio administris Livlandon, sian novan kolonion, kun multe da zorgo. Sed venis la tago, kiam ĝi devis foriri de tie. Petro la Granda klopodis proksimiĝi al okcidenta Eŭropo, kaj ekrigardis al la Balta-marĉo, decidinte al si tie „malfermi fenestron al Eŭropo.“ Tial la deklaro de milito al Svedio. Karlo XII^a estis venkata ĉe Poltava. La 15 julio 1710, post longa sieĝo, Riga estis prenata kaj la sorto de la baltaj provincoj fiksata. Livlando estis cedata al Rusio kaj du jarojn pli malfrue ankaŭ Estonio. En 1795, sub Katerino II^a, Kurlando ankaŭ estis unuigata al Rusio. Kiam Livlando estis prenata, Petro la Granda garantiis al la lando, krom la libereco konfesi la evangelian religion, la lokan aŭtonoman administron kaj tiun de la juĝado laŭ la landleĝoj. Tiu ĉi promeso estis tenita ankaŭ de liaj senperaj posteuloj.

De post la konkero de Livlando per Petro I^a, firma paco ekregis en la lando. Kiam en 1817 Aleksandro liberigis la sklavojn li donis al ili nenion el la teroj, kiuj devus aparteni al ili laŭleĝe kaj logike. La tuta loĝantaro, escepte la germanoj de la kasteloj kaj la germanaj negocistoj de la urboj, dronis en nigra mizero. Ĉiu, por vivi, estis devigata akcepti nehumanajn kondiĉojn, altrudatajn de la baronoj.

La germanaj baltoj konsistigis la aristokration, la pastraron, poste la intelektan klason, la grandan industrion kaj la grandan teran proprecon. La pli granda parto de la vilaĝa loĝantaro (70%) estis sen tero. La resto posedis malgrandajn farmojn aŭ kelkajn pecetojn de tero. En Livlando preskaŭ unu miliono da letonoj okupiĝis pri agrikulturo aŭ laboris por la

„sinjoroj“. Multaj baronoj efektive posedis po 10, 20, iufoje 25 landbienoj.

La letonaj vilaĝanoj de la baltaj provincoj ĝemis dum 700 jaroj sub la jugo de la baronoj, ili estis simplaj sklavoj. La 25 aŭgusto 1817 la baronoj devis liberigi siajn sklavojn, sed lasis ilin sen tero. La rajton pri ĝi rezervis al si la nobelaro. Tiu ĉi akto enhavas tragedian socian maljustaĵon, kiun suferis dum tuta jarcento la malfeliĉa popolo. La baltaj baronoj, nesignifa nombro, estis metintaj sian feŭdalan stampon sur la tuta vivo politika, socia kaj kultura, ili tenis la tutan landon en siaj feraj manoj. Ili ludonis terojn je plej pezaj kondiĉoj, kaj kiam ili vendis — provizore — pecetojn, tio estis je plej fantaziaj prezoj, super kio ankaŭ impostoj plej detruigaj. Jam en 1897 la proletariato formis 65 % de la kampara loĝantaro, kaj en 1905 — 1907 ĝi superis 70 %. Ĉiu nobelo havis tiom da plugebla tero kiom mil vilaĝanoj. Tiel la $\frac{3}{4}$ de la letona loĝantaro okupiĝis pri agrikulturo, kaj tial oni nomas prave la letonojn popolo de plugistoj „arajut auta“; tamen la laboro ne estis farata por la profito de la laboristoj, sed por tiu de 1400 baronoj.

Krom tio la poloj invadis de okcidento kaj de sudo, la danoj alboridiĝis kaj la germanaj mastroj (sinjoroj) sin donis jen al unu, jen al alia. Inter ĉiuj ĉi sin reciproke persekutantaj konkerantoj, nur la svedoj kaj la pola reĝo Stefano Batori sciis gajni la amon de siaj regatoj, precipe la svedoj, kiuj protektis la malfeliĉajn sklavojn. Sed nur post la liberigo de la sklavoj en la resto de la imperio per Aleksandro II^a, la letonoj havis rajton posedi terojn.

Radikala ŝanĝo okazis kiam Aleksandro III^a supreniris la tronon. Pobedonoscev komencis rusigi la baltajn provincojn. La lokaj tribunaloj kaj la administro estis anstataŭataj per rusaj institucioj. La loĝantoj de la baltaj provincoj, letonoj, estonoj kaj aliaj neniel kontraŭstaris al la rusigado de la lando, ĉar la rusa administro por ili estis malpli tirana ol tiu de la baronoj baltaj. Nikolao II^a daŭrigis la rusigadon komencitan de lia patro.

* * *

Multe da filologoj, kiuj ne profundigis en la demando, pensas, ke la letona-litova grupo estas slavaj idiomoj, sed sufiĉas preni letonan gramatikon por vidi la eraron. La gramatiko kaj vortaro letona, kiel la litova, estas pli proksimaj al la sanskrito ol tiuj de aliaj lingvoj nun parolataj en Eŭropo. La letona estas lingvo hindo-eŭropa de la grupo balto-slava kaj havas nenian parencecon kun la rusa kaj germana.

Ĉe la letonoj, kiel ĉe preskaŭ ĉiuj popoloj de Eŭropo, la unua literaturo, kiu floris, estas la parola literaturo, transdonata per tradicio de buŝo al buŝo. Ĝiaj popolaj rakontoj, kantoj, havas grandan artan valoron; oni trovas ĉiuspecajn, de la historiaj kantoj de eposa speco, kiel la rusaj *bujlinoj*, ĝis la sentimentalaj aŭ gajaj romanoj. La popola poezio havas karakteron precipe lirika kaj pastoralan. La verkoj letone skribitaj konsistas precipe el tradukoj, el kiuj la plej malnovaj datumas de XV^a jarcento.

La Reformo estis utila al la letona literaturo. La pastroj, ne povante instrui siajn parohanojn en germana lingvo, kiun ili ne komprenis, estis devigataj traduki en la landan lingvon la *Pater Noster*, la dek ordonojn, k. t. p., en 1526. En 1586 estis presata en Königsberg la unua preĝlibro. La tuta Biblio estis publikigata en 1689. Tiu ĉi traduko ludas en Letonio la rolon de la traduko de Luther en Germanio.

La unua notinda nomo en la letona literaturo estas tiu de Stender la malnova (1714—1799), poeto, scienca verkisto kaj vortaristo. Post li estis flortempo de poetaj talentoj, Girgensohn, Hugenberg, Henri la blindulo, la unua poeto-vilaĝano (1789—1825), fama per siaj kantoj de libereco, Hans Liwenthal, Hans Leitans, Ernest Dunsberg. Sed en la literaturo, Merkel (1769—1796) estis la unua, kiu konigis la veran situacion de Letonio siatempa; li insistis pri la neceso liberigi la sklavojn, kaj lia verko, ofte represata, estas tre leginda. Pastro Elverfeld (1756—1819) estis la unua originala dramaŭtoro. La kreinto de la letona teatro estas Jean Stender (1794—1819), filo de la malnova, kun sia fama teatraĵo *Shuhpu Behrtuls*, predikanta kontraŭ la vino kaj la alkoholaĵoj. La letonoj havas pasion al teatro.

Ĝis la mezo de XIX^a jc., la letona literaturo estis nur rebrilo de la germana literaturo, ĉar pro la pezanta tiraneco en la lando la fremdaj lingvoj estis nekonataj. Post la

liberigo de la sklavoĵ, la popolo sin donis kun rimarkinda entuziasmo al literatura laboro. Ĵurnaloj fondiĝas, malgraŭ la severeco de la cenzuro la politika vivo naskiĝas. Aro da ĵurnalistoj sin dediĉas al la interesoj de la lando, el kiuj la unua talentulo estas Christian Waldemar. Li ĵetas la ideon, kolekti la trezoron de la letonaj kantoj, kaj baldaŭ kolektiĝis pli ol 200,000, el kiuj 5000 estis publikigataj en 1873 kaj 1874.

Dume la lirika poezio kaj la romano ekprosperis. Aperas poetoj grandtalentaj, kiel Pumpur kaj Auseklis. La unua estas aŭtoro de eposa poemo *Lahtschplesi* (Ursvenkanto), laŭ la nomo de nacia heroo, defendanto de la libereco de sia popolo. La popolo kredas ankoraŭ, ke li vivas kaj venos liberigi sian landon. La dua estis tre persekutita de la nobeloj kaj de la rusaj aŭtoritatoj, kiuj ne rigardis favorokule la demokratajn ideojn vekigantajn en la spiritoj de la juna generacio. Malgraŭ ĉio Pumpur kaj Auseklis sciis montri sian patriotismon kaj talenton. Nomindaj el tiu epoko estas ankaŭ la poetoj Janis Essenberg, Janis Pavasars, Edwarts Wenskis, Martin Lapa, P. Blau, Ludwig, Bersin, k. a. Agrablajn novelojn priskribantajn la popolajn morojn lasis la prozisto Neuken (1835—1868). La fratoj Kaudzit en sia rimarkinda romano „En la tempo de la termezuristoj“ priskribis la intrigojn ĉirkaŭ tiuj, kiuj devis mezuri la terojn luatajn al la vilaĝanoj. Tiuj teroj pasis ĉiujare en la manojn de alia familio, pro la subaĉetemo de la nobelaj oficistoj; la korupto estis ĝenerala.

De post 1890 nova spirito rimarkiĝas en la letona literaturo; la socialismo aperas, ĝi inspiras noblajn intelektojn kiel E. Weidenbaum kaj E. Treumann, talentaj lirikpoetoj.

Ĉiuokaze la nomoj, kiuj brilas pleje ĉe la poeta firmamento estas tiuj de Pleekschan-Rainis kaj de lia edzino Elsa Rosenberg, konata sub sia pseŭdonomo Aspasia. Rainis kaŭzis bonfaran influon super sia popolo, kaj li estas admirata kaj amata de la tuta popolo de Kurlando kaj Livlando. Li koniĝis kiel redaktoro de la ĉiutaga ĵurnalo *Dianas Lapa*, malpermesita de la cenzuro. Li estas vera martiro de la letona libereco. Lia unua granda sukceso estis traduko de Faust. Post ĝi, li donis „Pusidealists“ (Duonidealistoj), komedio kie la aŭtoro kontraŭstarigas la demokratian idealon

al la malprogresemaĵoj; „Uguns un Nakts“ (Fajro kaj Nokto) kaj „Indulis un Aria“, konsiderataj kiel plej belaj verkoj de la drama letona literaturo. Lia edzino, kiu partoprenas lian ekzilveron, estas la plej granda dramaŭtoro-virino, kiun produktis la letona lingvo. Ŝia dramo „Sandetas teesibas“ (Perditaj rajtoj) kaj „Neaissneegts mehrkis“ (Mistrafitaj celoj) estas en la repertuaro, samkiel ŝiaj dramoj „La Vestalo“ kaj „La Arĝenta Vualo“. Ĉiuj estas inspirataj de la amo al progreso kaj al libereco. Ŝiaj virinoj estas liberigitaj je la malnovtempaj kredoj kaj antaŭjuĝoj. Iu kritikisto diris, ke la verkoj de Aspasia estas la florornamantoj de la poeta krono de Letonio. Nun ambaŭ poetoj, loĝantaj en la pacinsulo Svisio, verkas dramon pri la franca Revolucio.

Aliaj el la plej rimarkindaj nuntempaj verkistoj estas: Skalbe, Upit, Assar, Birkert, k. a. La nombro de verkistoj, poetoj, prozistoj, kritikistoj, politikverkistoj estas vere eksterordinara.

* * *

La karaktero de la baltaj provincoj rememorigas tiun de Orienta Prusio. Plata lando, escepte Livlando, kiu estas monta regiono, riĉa je lagoj kaj arbaroj, sed kie nenio estas ekstrema, kie ĉio harmonias kaj donas impreson de trankvila beleco. La klimato estas relative modera. La malvarmo neniam estas tiel supermezura kiel ekzemple en centra Rusio, kaj la varmo ne atingas tie la brulantan ardon, kiu sekigas la rusajn stepojn. La proksimeco de la maro mildigas la klimaton, kaj ĝin faras tre favora al la agrikulturo. De vidpunkto de la kulturo, la baltaj provincoj okupas la unuan vicon en Rusio; la tero estas tie laborata laŭ ekzempla maniero.

El ĉiuj tri partoj, kiuj formas la belan Letonion, la plej pitoreska estas la sudorienta, nome Letgalio. Norde ĝi estas eksterordinare arbara kaj marĉa kaj nur maldense loĝata. Aliloke tamen la grundo estas fruktodona. La Luban-lago (85 km²) kun Evsto kaj aro da aliaj riveroj kaj riveretoj formas potencon akvobasenon, kiu kaŝas en si vastajn arbarojn kaj preskaŭ netraireblajn marĉojn. Vilaĝoj troviĝas tie ĉi nur malofte, ĉar estas nur malmulte da sekgrundo konvena por koloniigo. Tial ke neniam vojoj ekzistas, la loĝantoj

povas nur dum seka jartempo atingi tra arbarvojetoj siajn herbejojn, kiujn ili tuj post la fojnfalĉo denove forlasas por reveni al siaj ofte 30—40 km. malproksimaj vilaĝoj; la fojno estas venigata nur en vintro, ĉar ĉevaloj en somero ne povas penetri. Ofte dum pluva somero la vilaĝoj estas dum monatoj elŝositaj de la ekstera mondo, kaj nur en vintro malfermiĝas por ili sur la frostitaj marĉoj kaj ŝlimoj la konvenaj komunikvojoj al la ekstera mondo.

Tute alian bildon prezentas la suda parto, komenciĝanta de la pitoreskaj bordoj de Rasno-lago ĝis la bruanta Dvinarivero. Tiu regiono estas dense loĝata, kaj kvankam la grundo ne estas speciale fruktodona, ĝi konvenas ĉie por konstruo. Akvoriĉeco ekzistas ankaŭ ĉi tie, sed havas alian formon. Lagojn kaj lagetojn oni rimarkas preskaŭ en ĉiu bieno kaj granda vilaĝo. El cent km² oni kalkulas certe ne malpli ol cent grandajn kaj malgrandajn lagojn, kiuj daŭras inter montetoj kaj montoj kaj donas al la pejzaĝo pitoreskan ĉarmon; speciale bela estas la ĉirkaŭaĵo de la nubmonto apud Rasno-lago. La terspaco inter la apartaj bienoj kaj vilaĝoj estas malpli vasta ol en la nordparto. Tie ĉi ekzistas multaj kaj pli oportunaj komunikvojoj; tial la komerco estas vigla, la kultura disvolvo prospera; Rositten kun siaj unuigoj kaj lernejoj fariĝas kiel ekonomia kaj spirita centro de la lando, kaj la loĝantoj impresas kiel vivĝojaj, laboremaj kaj energiaj homoj.

Ankaŭ ekonomie Letgalio jam de nememorebla tempo celas al la baltaj provincoj. Preskaŭ ĉio estas eksportata per la havenoj de Riga, Libau aŭ Vindau, kaj tiuj urboj estas la komercaj centroj por la lando. Eksportataj estas ligno, lino, greno, butero, birdaro, kaj estas importataj semoj, artefaritaj sterkoj, agrikulturaj maŝinoj. Por disvolvo de la ekonomiaj rilatoj multon faras la granda letona kompanio, la ekonomia societo „Letona Terkulturisto“ kun siaj filioj en Dvinsk, Rositten, Ludson kaj aliaj lokoj. Letonio posedas en sia tero nenium el la trezoroj de krudaj materioj necesaj al la industrio.

En Letonio oni donas grandan signifon al la publika instruado, kaj la malkleruloj estas fenomeno. La analfabetuloj estas esceptaj, la unuagrada instruado estas entute tre bona. La lernejoj reformoj datumas de la sveda okupado, ili estis aparte efikaj, ĉar la letono alligas multe da graveco

al la instruado de siaj infanoj, ne konante maldiligenton kaj senzorgon. Koncerne la duagradajn lernejojn, Letonio klasiĝas ĉe la frunto de ĉiuj civilizitaj landoj, ĉar en 1910 estis en la lando 98 duagradaj lernejoj kun 22,600 lernantoj, t. e. 1 lernejo je 26,000 loĝantoj. Sampaŝas nur Norvegio, kie oni kalkulas ankaŭ 1 duagradan lernejon je 26,000 loĝantoj, dum en Belgio estas 1 je 41,300 loĝantoj, en Francio je 44,600, en Germanio je 54,100, k. t. p. La atingita grado de kulturo estas tiom pli laŭdinda, se oni konsideras, ke ĉiuj rezultatoj ĝis nun devenas de la privata agado. La rusa ŝtato ne kuraĝigis la kulturajn emancipon de la letonoj, sed kontraŭe ĝin malhelpis, samkiel la gvidantaj germano-baltaj klasoj pro timo de konkuro de floranta letonismo.

La letonoj estas tre alligitaj al la grundo kaj precipe avidaj je libereco, kio klariĝas tre bone pri tiel malgranda popolo, kiu sciis konservi preskaŭ pura sian rason kaj sian lingvon dum jarcentoj, superversitajn de sango kaj turmentoj senĉesaj. Aliflanke la ĉiam pliboniĝanta lereduko kaj la superpezo de la evangelia religio kvazaŭ riveligis en la letona popolo la de la naturo al ĝi donitan fortan liberecsopiron kaj en kuniro kun la rusa revolucio disvolviĝis forta socia movado. En 1905, ĉe la unua rusa revolucio, le letonoj estis la unuaj, kiuj solidariĝis kun la revoluciuloj.

La fakto, ke la letonoj organizis en 1915 spontane nacian armeon, konsistantan grandparte el volontuloj, ĉe la flanko de Rusio, montras klare iliajn simpatiojn. Ili estas respublikaj kaj socialistaj, kaj celas al la realiĝo de la rusa federa respubliko. Ĉiuj letonaj organizaĵoj sin deklaris por tio. Ĉiuj letonaj verkistoj, ĵurnalistoj, pastroj, ĉe kies frunto estas la fame konata Rainis, proklamas la demokratigon de ĉiuj institucioj, la forigon de la privilegioj de la balta nobelaro, la egalrajtecon de ĉiuj antaŭ la leĝo, la aŭtonomion de Letonio en federa Rusio, aŭ postulas sendependan kaj neŭtralan Letonion sub internacia garantio.

Estonio

Estonio, preskaŭ nekonata ĝis nun, estas negranda malnova rusa gubernio, limigita de la Finnlanda-golfo, Rigagolfo, Livonio kaj Petrograda gubernio. Ĝi konsistas el la plej norda parto de la baltaj provincoj, el la orienta parto de Livonio ĝis la linio Izborsk, Valk kaj la rivero Salis. Al ĝi apartenas ankaŭ la najbaraj insuloj Oesel, Dago, Moon, k. t. p. kaj grandaj kolonioj de Ingrio aŭ Ingermanlando, tiamaniere, ke la estonoj okupas preskaŭ la tutan landon de la ĉirkaŭaĵoj de Pskov ĝis la antaŭurboj de Petrogrado, ĉirkaŭ 60,000 km². La nombro de la loĝantoj atingas preskaŭ unu milionon, el kiu la estonoj formas 90 0/0, la germana elemento ne superas 5 0/0, kaj la resto estas rusa.

La estonoj estas popolo de turana deveno, de ugro-tatara raso, parenca al la finnoj, hungaroj, turkoj kaj tataroj de Volga, Krimeo kaj Uralo. Ili havas ankaŭ verŝajne ian parencecon kun la mongoloj kaj japanoj, kvankam fizike ili neniel similas al la tataraj rasoj. La estonoj nomas sian patrolandon *Wiromaa* (apudlima lando) aŭ *Estimaa* (nia tero).

Oni kredas, ke la turanaj bandoj, puŝitaj de la mongoloj kaj de aliaj barbaraj popoloj, invadis sian nunan landon ĉirkaŭ unu jarcento antaŭ Kristo. Ili restis tie sendependaj dum pli ol mil jaroj, meze de furiozaj luktoj. Oni scias, ke en la XII^a jarcento estis predikata krucmilito kontraŭ la idolanoj de la marbordo, kaj ke la papo benis la militantojn kiuj ekstermis tiujn nekredulojn. La teŭtonaj kavaliroj kaj la glavportantoj akiris la landon kaj kun krueleco ili altrudis la kristanan religion al la loĝantoj. La teŭtona ordeno kaj tiu de la glavportantoj fandiĝis, sed la sorto de la popolo ne pliboniĝis: ĝi fariĝis servuta, ligita al la pluga kampo.

Dum la Reformo, la ĉefoj de la ordeno rapidis konfiski la ekleziajn bienojn kaj sin proklami laŭleĝaj mastroj de la teroj kiuj apartenis al la kavaliroj. La sola progreso kiu

rimarkiĝis en la lando estis, ke la vilaĝanoj kiel iliaj mastroj devis fariĝi luteranoj.

Ĝis la sveda okupo, la stato de la estonoj estis tiu de la usonaj sklavoj. Neniam la nobeloj faris ion por instrui siajn sklavojn. Estonio sin donis libere al la sveda-finna ŝtato en la XVI^a jarcento. La regado de Svedio estis bonfara. La sveda periodo estas ankoraŭ konsiderata de la popolo kiel „ora epoko“. La latifundioj fariĝis ŝtataj bienoj, kaj la lernejoj havis tiel grandan sukceson, ke en 1698 preskaŭ ĉiuj plenaĝuloj sciis legi. Interalie estis fondita la universitato de Dorpat (Juriev). La lando ĝuis fruktoportan pacon, kiu permesis ripari la ruinojn kaŭzitajn de la jarcentoj da oftaj militoj. La rusa konkero venigis plialtigon de la suferoj. La sklaveco estis restarigata. La nobeloj administris ne nur la baltajn provincojn, sed la tutan imperion, kaj fera mano dispremis ĉiun emon al progreso, malgraŭ la belaj paroloj de la imperiestrino Katerino II^a. Tiu ĉi malluma epoko daŭris ĝis 1817, jaro en kiu Aleksandro II^a liberigis la sklavojn, kvankam ĝi estis nova trompo. La estonoj, kiel la letonoj, kiuj kulturis la teron de siaj praavoj, estis simple deklaritaj „liberaj“, sed ili posedis nenion, eĉ ne unu colon da tero, kaj havis nenian rimedon de ekzisto, krom lui teraĵojn ĉe la nobeloj je plej troigitaj prezoj.

Post 1817 estis malpermesite al la liberaj vilaĝanoj forlasi sian vilaĝon, tiamaniere ke neniu povis rifuzi sin submeti al la terprezroj fiksitaj de la baronoj, kiuj estis ĉiam la absolutaj mastroj. La malsato devigis la vilaĝanojn, de post la dua deko de XIX^a jarcento (1820—1830) ribeli, kaj tiuj tumultoj renoviĝis plurfoje ĝis 1860. La nobeloj estis devigataj cedi iom; tamen iliaj cedoj ne koncernis la tutan loĝantaron, sed kondukis nur al la formiĝo de privilegia klaso, la vilaĝanoj posedantoj de farmoj. Oni vidis tiam grandajn farmojn; la farmistoj riĉiĝis, dum la resto de la loĝantaro trovis nenion alian vivrimedon ol ludoni sian laboron aŭ iri en la urbon, kie formiĝis la urba proletario.

Al la mizero sin aldonis la religia persekuto. En 1841, la registaro de Nikolao I^a faris ĉion por konverti al ortodoksismo la estonajn kaj letonajn protestantojn. Oni promesis al ili ĉiuspecajn avantaĝojn, sed apenaŭ aliĝintaj al la oficiala Eklezio, ili estis forlasataj kaj neniu el la promesoj estis

tenata. En 1861, ĉe la liberigo de la rusaj sklavoj, la estonaj vilaĝanoj ricevis la rajton aĉeti terojn; nur de tiu ĉi momento komenciĝas la intelekta vivo de l' popolo kaj ĝiaj progresoj. Tuj la deziro al instruigo forte montriĝis, la tuta lando estis kvazaŭ transformita. La malnova sklavigita popolo relevis la kapon kaj postulis sian lokon sub la suno.

Sed la religiaj persekutoj rekomenciĝis sub Aleksandro II^a kaj ĉesis nur dum la revolucio de 1905. Tiu ĉi estis entuziasme akceptita de la estonoj, same kiel de la letonoj, sed la reakcio estis terura. La malmultaj rajtoj konsentitaj al la estonoj por la balotoj de la Duma estis forprenataj. La revenĝoj estis sangaj, la popolo estis plu nenio, sed la espero restis en la fundo de la koroj. La lernejoj estis rusigataj kaj ekscesa rusigado komenciĝis. Oni forigis la estonajn societojn, oni malpermesis la gazetojn, la estona lingvo estis persekutata.

* * *

La estona lingvo apartenas al la finna grupo kaj estas riĉa je vokaloj; ĝi estas unu el la plej mildaj de Eŭropo; oni ne trovas gorgajn aŭ palatajn sonojn, tiel oftajn en la germana kaj eĉ en la rusa lingvo. Ĝi estas tre kanta.

La estona literaturo estas eble malpli riĉa ol la letona, sed ĝi posedas epopean poemon, la „Kalevipoeg“, tiel rimarkindan kiel la „Kalevala“ de la finnoj. Kiel la letonoj, la estonoj havas tradician literaturon ekstreme riĉan. Ekz. S-ro J. Hurt (1906) kolektis 40,500 popolkantojn, 8509 rakontojn, 75,000 proverbojn, 37,000 enigmojn k. t. p.

La unua grava literaturisto estis la pastro G. Muller († 1608), kiu lasis serion de romanoj, publikigitaj nur en 1899. Heinrich Stahl (1600—1657), gramatikisto, forjetante la popolan lingvon, kreis literaturan, malfeliĉe alprenitan ĝis la fino de la XVII^a jarcento. Poste, Rossinius tradukis la luteranan kateĥismon, Gutsclaff la Biblion (1056), kaj Hormung (1664—1715) alprenis la popolan lingvon kaj skribis belegan gramatikon.

De post la fino de la XVIII^a jarcento, la influo de Francio sentiĝas, la junuloj alportas el Parizo ideojn de libereco. H. Arvelius (1753—1805) priskribas la morojn, W.-L. von Luce (1750—1879) kolektas la tradiciajn verkojn kaj la

folkloron; Rosenplänter (1782—1846), ĵurnalisto, estas ĉirkaŭata de aro da junaj talentoj; O.-W. Masing (1763—1832) publikigas la *Maarahwa Nädalaleht*, unua kampa ĉiusemajna gazeto. Kristian-Jack-Peterson (1801—1822) estas la unua el la poetoj individualistaj.

Ĝis la mezo de la XIX^a jarcento la verkistoj estis de germana raso, ĉar la sklavoĵoj ne havis la eblecon instrui siajn infanojn; post 1861, la estonoj mem povis plivastigi sian literaturon. Fr. Fühlmann (1798—1850) rekonstruas la kosmogonion kaj la mitologion de la idolanaj estonoj. La plej granda verkisto de tiu ĉi epoko, kiun oni povas vicigi kun la plej grandaj poetoj de Eŭropo, estas Frederic Reinbold Kreutzwald (1857—1861), aŭtoro de la epopeo *Kalevipoeg*, kiu estis publikigita en 1862 kaj akiris universalan famon. Tiu ĉi granda poemo estas tradukita en multaj fremdaj lingvoj kaj estas analizita en centoj da artikoloj kaj libroj en la ĉefaj literaturaj lingvoj de l' mondo. Ĉiuj aŭtoroj entuziasmiĝis por tiu verko, kiun oni komparis al Iliado kaj Odiseo. Tiu ĉi epopeo rakontas la vivon kaj legendajn heroaĵojn de reĝo de Estonio, Kalevipoeg, kiu vivis en la XII^a jarcento. Estas priskribo de luktoj kontraŭ la malamikoj kaj kontraŭ misteraj fortoj, de klopodoj, kiujn la reĝo faras por la bono de sia popolo, fine lia perdiĝo sekve de kelkaj eraroj de li faritaj. La apero de tiu ĉi poemo estis kvazaŭ revelo de la poeta genio de l' estona popolo. Samtempe ĝi montris, ke la estonoj revekiĝis al nacia konscio. Kreutzwald skribis ankaŭ novelojn, teatraĵojn, rakontojn por infanoj, sed nur lia postmorta poemo *Lembitu* havis grandan sukceson. Nur dank' al la influo de Kalevipoeg oni povas kompreni la ideojn de la fama poetino Koidula, granda verkistino, kiu okupas la unuan lokon inter la aŭtorinoj pro la profundeco de la pensoj, la viveco de la amo al la homaro. Ŝiaj poeziaĵoj, kiuj prikantas la malgajan sorton de la estonoj en la pasinteco, la dolorojn, la mizeron de la tuta popolo, ne havas egalajn en la estona lingvo, kvankam ĝi estis imitata de multnombraj aŭtoroj. Ŝia patro, Johann-Waldemar Jannsen (1819—1890) estas la fondinto de la unua estona gazeto *Perno Postimees* (1857) kaj liaj verkoj konsistas precipe el noveloj, malgrandaj romanoj, rakontoj.

La unua serioza politika publicisto estas Jacobson

(1841—1882), redaktoro de la ĵurnalo *Sakala*. Oni ne devas forgesi Liiv, kies verkoj estas trapenetritaj de malhela pesimismo. Eduard Wilde (nask. 1865) suferas de malzorgo pro rapideco ĉe la verkado, sed li korektiĝas precipe en sia verko *Külmale maale* (En malvarma lando), kie oni vidas la moralan falon de honesta vilaĝano, kiun la bezono, la medioj difektas iom post iom, kaj kiu fine estas kondamnata al forpelo en Siberion. Reiman (nask. 1861) estas specialisto de la estona literaturo; li publikigis multajn malnovajn skribojn, el kiuj kelkaj estas tre rimarkindaj. De la popolkantoj estas kolektita grandega kvanto kaj estas publikigitaj ekz. la *Kantoj de la Setukesoj*¹ en 2000 paĝoj je 2 kolonoj.

La fino de la XIX^a jarcento ne estas tre rimarkinda el literatura vidpunkto, sed la nombro de la verkistoj kreskas rapide. La persekutoj kontraŭ la lingvo disvastigis profundan pesimismon en la literaturo. Citindaj estas Tamms (1861—1907), lerta tradukanto de rusaj kaj fremdlandaj poetoj, Sööt (nask. 1862), kiu en siaj versoj priskribas la mizeran situacion de la vilaĝano, malfeliĉa viktimo de l' manko de tero, Anna Hawa (nask. 1864), kiu vidas nenion feliĉan en la vivo ol siajn infanajn jarojn.

Post la revolucio de 1905 la nacia ideo malkovriĝis pli kaj pli en la cerboj. La literaturo ne estis malatentata, falango de junuloj sin konigis. Oni povus citi inter la plej naturdotitaj Tuglas (Michelson), eminenta romanisto kaj rimarkinda kritikisto, kun nomo tre populara, kies plej bela verko ĝis nun estas *Zumala Saar* (Insulo de Dio), simbolista romano kun riĉa kaj eleganta lingvo, Gustav Suits kaj V. Ridala, poetoj simbolistaj. La teatro estas reprezentata precipe de Kitzberg kies plej sukcesintaj dramoj estas *Tuulte Pöörises* kaj *Libahunt*. De post 1908 la Estona Literatura Societo publikigas revuon titolitan *Esti Kurjandus* (Estona Literaturo) dediĉitan precipe al la studo de la estona lingvo, folkloro kaj historio de la literaturo. La milito interrompis la literaturan fervoregon de la estonoj, sed ĝi refloros.

* * *

Estonio estas lando de sabloplenaj aŭ ŝtonhavaj, malmulte fruktodonaj ebenaĵoj; melankolia, malvarma kaj malseka re-

¹ Estonoj de la distrikto de Pskov.

giono, kaŭze de la maro kaj de la multego da lagoj kaj marĉoj. Ĉefaj eksportaĵoj estas butero, fiŝo kaj ligno. La ĉefurbo estas Tallinn (Reval), la universitata urbo Tarto (Dorpat aŭ Juriev).

Ĉiuj vojaĝantoj kaj etnografoj konstatis ĉe la estonoj grandajn ecojn. Ili estas ekstreme energiaj, entreprenemaj, ŝparemaj. Ili sciis transformi la preskaŭ senkreskan teron en grundon fruktodonan. Malgraŭ la malgrava tavolo de kulturebla tero, kiu tute kovras la landon, ili kreskigis, per multe da pacienco kaj laboro, belajn rikoltojn. Ili estas certe la plej bonaj terlaboristoj de Rusio kaj, en Petrogrado, la butero, la kampokulturaj produktoj de Estonio kaj de la estonaj kolonioj vendiĝas multe pli kare ol la aliaj similaj produktoj. En la rusa komerca ŝiparo, la ŝipestroj, la pilotoj k. s. estas preskaŭ ekskluzive estonoj, la simplaj maristoj estas rusoj. Ĉie oni rekonas la superan inteligentecon de la loĝantoj de la suda flanko de la Finnlanda-golfo. La anglo Wahl diras, ke la estono estas ĝenerale serioza, sed mallerta, malfidema al la fremduloj, malmulte ŝercema, pacienca, flegma, sed kun elprovita kuraĝo.

De post kiam ili povis labori por si mem, la estonoj faris mirindajn ekonomiajn progresojn. La popolo amasigis monrimedojn kaj aĉetis la terojn de la nobeloj. Nun jam 40 % de la tero pasis en la manojn de la laboristoj kaj, sen la milito, la proporcio estus ankoraŭ pli granda.

La estonoj, kiel la letonoj kaj finnoj, havas nur malmulte da analfabetuloj; nun oni kalkulas 85 % da personoj sciantaj legi kaj skribi (inter la virinoj estas 95 %).

Estonio ŝajnas momente multe malpli en interkonsento kun si mem rilate al sia estonteco ol Finnlando. Du fluoj tie estas kontraŭaj: estas farata aktiva propagando favore al la respublika ideo, kaj samtempe favore al alianco inter Estonio kaj Finnlando. La estona Dieto, kunvokita lastatempe, aklamis la plenan aŭtonomion de la lando interne de la rusa demokrata kaj federa respubliko.

La estona popolo, gardante netuŝita sian fidon, persistas kredi, ke kiam sonos la horo de la justeco, oni ne forgesos ĝin kaj donos la lokon ŝuldatan al ĝi en la liberama Eŭropo. La principo de la naciecoj postulas tion, sed la devizo „unuiĝo faras forton“ ne devas esti forgesata.

Finlando

La lando de la mil lagoj, Finnlando (Suomi), estas duon-insulo formita de la Finnlanda kaj Botnia golfoj kaj de la Norda Oceano. Ĝi okupas 377,426 km² (12 0/0 da lagoj), kies loĝantaro superas la nombron de 3,100,000 kaj konsistas el 80 0/0 finnoj (Suomalainen) kaj la resto el svedoj, rusoj, hebreoj kaj norde laponoj.

La finna raso venis en la nun okupatan landon en epoko tre malproksima. La metaloj tiam estis al ĝi nekonataj, kaj la finnoj vivis de ĉaso kaj fiŝkapto. Pli malfrue ili bredis kelkajn hejmbestojn, sed ĝis la XII^a jc. ili restis duonnomadoj. Depost la VII^a ĝis la komenco de la XIV^a jc. ilia lando estas milite disputata inter la svedoj kaj la rusoj de Novgorod. Submetitaj en la XIII^a jc. al Svedio, ili falis en la komenco de la XVIII^a jc. sub Rusion. Subpremita de la najbarlandoj, dezertigita dum la „tumultoj“, sufokita dum la maloftaj pacperiodoj sub pezaj militŝarĝoj kaj supermezuraj impostoj, kompatinda Finnlando konas tiun trankvilan prosperecon, kiun ĝi alrevis, nur en la dua parto de l' XIX^a jarcento, dum la tridek jaroj, kompare feliĉaj, kiuj antaŭiris la senkompatan rusigan provon de l' caro Aleksandro III^a.

La finnoj vivis pace, fidelaj al sia kurioza idolaneco, kiam en 1157 la sveda reĝo Erik venis prediki al ili la kristanan religion, helpita de potenca armeo. Li renkontis furiozan reziston, kaj la lando estis terure dezertigata. Por ne morti, la transvivintoj sin konvertigis, kaj Finnlando submetiĝis religie sub la Eklezio, politike sub Svedio. En 1525 la lando adoptis la luteranisman, kiu fariĝis la oficiala religio. En 1723 la pli grandan parton de Karelio (provinco Viborg) forprenis Svedio, kaj per la paco de Abo, en 1743, multaj aliaj urboj estis cedataj al Rusio.

Svedio estis alportinta civilizon en Finnlando, kaj tiu ĉi estis egalrajte reprezentita en la sveda parlamento, partoprenis egalrajte en la elekto de reĝoj k. t. p. Kvankam la lando ĝuis

certain aŭtonomion, la konstanta tendenco de Svedio estis svedigi ĝin. La provoj de disiĝo inter ambaŭ landoj estis oftaj, verŝajne pro tio, ke Finnlando ĉiam pagis la plej altan milittributon. Depost la XVI^a jc., duko Johano, filo de Gustavo Vasa, provis proklami la sendependecon de Finnlando. Je la fino de l' sama jarcento, Fleming ribeliĝis kontraŭ la landreganto, princo Karlo, pli malfrue reĝo Karlo IX^a. Similaj provoj sub la rusaj imperiestrinoj Elizabeto kaj Katerino II^a ankaŭ malsukcesis. Kiam en 1808, dum Svedio okupiĝis pri Norvegio, Rusio invadis la landon, la finnaj liberaloj konvinkis Aleksandron I^{an} lasi al Finnlando ĝiajn instituciojn, religion kaj memstaran administron. Aleksandro kunvokis la deputataron (Dieton) la 17 marto 1809 en Borgo kaj tie legis manifeston, promesante konservi la fundamentajn leĝojn de Finnlando, kaj la deputataro ĵuris fidelecon al la imperiestro de Rusio, grandduko de Finnlando, kaj al la konstitucio. Laŭ la pactraktato de Fredrikshamm (1809) Finnlando estis unuigita kun Rusio kiel duklando, kaj de tiam dividis ĝian sorton. Ĉiuj posteuloj de Aleksandro siavice ĵuris respekti liajn promesojn, sed ne ĉiam plenumis ilin.

Kiel dirite, Aleksandro I^a ne forigis la deputataron, nek la senaton, nek la komunumojn. Malgraŭ la reakcia periodo, kiu sekvis de post 1812, kaj dum kiu la deputataro ne kunvenis, kaj malgraŭ la severa cenzuro, la materia prospereco de la lando kreskis, same kiel la loĝantaro. Samtempe la militŝarĝoj, kiuj estis tiel malfacilaj por la lando sub la sveda regado, fariĝis malpli grandaj ol tiuj de la rusoj. Ili prezentis 28 % de la rusa buĝeto, kaj nur 17 % de la finna; 33 % el la tuto de rekrutoj estis kolektata en Rusio, nur 11 % en Finnlando. Aleksandro II^a kunvokis en 1863 la unuan deputataron, kaj de tiam ĝi estis kunvokata ĉiun kvinan jaron, poste ĉiun trian, kaj povis realigi multajn gravajn reformojn: en 1864 forigo de la privilegioj de l' nobelaro, emancipo de la virino je 20 jaroj; en 1865 komunumaj konsilantaroj elektataj en la vilaĝoj, liberala reformo de la urba regado; en 1867 forigo de la cenzuro; en 1872 apartigo de la eklezio kaj de la lernejo; en 1879 seksegaleco en la heredoj, libereco de la virinoj okupi ĉiujn metiojn; en 1888 plilarĝigita religia libereco; ĝenerala malpermeso de alkoholaĵoj k. t. p.

Kvankam li en 1881 ĵuris respekti la finnajn rajtojn, Aleksandro III^a komencis apliki politikon de rusigado. Li procedas milde kaj laŭgrade. Rusaj liceoj estas kreataj en Finnlando, la kono de la rusa lingvo estas postulata en ĉiuj superaj administrejoj; en 1891 oni decidas, ke la oficiala korespondo fariĝu en rusa lingvo, la poŝtservoj estas unuigataj, la speciala Komitato de finnlandaj aferoj, starigita en Petersburgo, estas forigata, la rublo estas altrudata.

Sub Nikolao II^a komenciĝas la malkaŝa lukto inter Finnlando kaj la carismo. En 1898, la rusa registaro prezentas militan leĝoprojekton al la deputataro: ĝi postulas plian kontingenton da 7000 viroj; la deputataro forĵetas la projekton. Tiam aperas la ukazo de februaro 1898: la caro de Rusio, grandduko de Finnlando, pretendas, ke li sola povas leĝdoni pri la demandoj koncernantaj samtempe la imperion kaj la grandduklandon. La deputataro povas nur esprimi dezirojn, la finnaj senatanoj devas esti elektataj de la caro, k. t. p. La sendependeco de Finnlando malaperis. Tuj petskribo subskribita de 500,000 nomoj estas prezentata al la caro. Li rifuzas akcepti la delegitojn de la subskribintoj. La protestoj de la gazetaro estas severe sufokataj. Simplaj ukazoj altrudas la rusan lingvon en la diskutoj de l' Senato, altrudas la poŝtojn, la monon kaj precipe la rusan policon. La finna armeo estas forigata, la rekrutoj devas esti sendataj en la rusan armeon. La rezisto al la subpremo organiziĝas. Grandnombre forkuras eksterlanden la soldatoj vokataj en Rusion; la senatanoj, la oficistoj eksiĝas kaj elmigras kun siaj familioj. La deputataro obstine postulas la restarigon de la konstitucio. Rusa guberniestro estas eĉ mortigita. Fakte, la finnoj adoptis nek la lingvon, nek la religion rusan; ili volas resti finnoj, kaj tio ĉi estas ilia rajto.

Sed kun la ekonomia progresado de la XIX^a jc. ĉie estis starigita nova problemo, interne de l' nacioj mem, problemo pli grava ol tiu de l' naciecoj kaj rekte interesanta la popolmason. En Finnlando, la malamikeco inter la sociaj klasoj pli grandigiĝis, plifortigita per lingvodiferencoj: svedo kontraŭ finno. La rusa revolucio donis la okazon de milito inter tiuj klasoj: la luktoj estis tre akraj.

Post tio, ĝis la momento kiam eksplodis la milito, la rusa registaro ĉiam penis malamikigi al si la finnan popolon.

En la komenco de la milito, anstataŭ klopodi por regajni iom da simpatio en Finnlando, la rusa registaro, obeanta al la reakciuloj, nuligis ĉiujn liberrajtojn de Finnlando . . .

* * *

La finna lingvo konsistigas unu el la du subdividoj de l' finno-ugra branĉo de la uralo-altajaj lingvoj. Ĝi estas, kiel la aliaj samfamiliaj lingvoj, aglutina. Laŭ la fama filologo Rask, la finna lingvo estas unu el la plej harmoniaj kaj plej perfektaj de l' terglobo. La alfabeto kalkulas nur 8 vokalojn kaj 13 konsonantojn. La literoj *b*, *f*, *d* kaj *g* ne povas esti elparolataj de la finnoj en vortkomenco; oni anstataŭigas ilin en esprimoj pruntitaj el fremdaj lingvoj per *p*, *v*, *t* kaj *k*. Neniu vorto komenciĝas per pli ol unu konsonanto. La nombro de l' diftongoj estas tre granda. Ĉiuj vortoj finiĝas per vokalo kaj enhavas malofte du sinsekvajn konsonantojn. La konjugacio kaj precipe la deklinacio prezentas riĉecon de rimarkindaj formoj, dank' al la abundeco de sufiksoj, permesantaj esprimi la plej delikatajn nuancojn de l' penso. Krom la ĉefakcento, sur la unua silabo, estas ankaŭ aliaj akcentoj, sur ĉiu nepara silabo, kio donas al la lingvo tre markitan ritmon. La kunmetataj vortoj estas tiel nombraj kiel en la germanaj lingvoj.

La finnoj havas grandan emon al la poezio kaj kanto, kaj ilia orelo estas tre delikata por la ritmo. Iam ilia poezio ne allasis la rimon. Finnlando posedas multe da malnovaj kantoj nomataj *runoj*, kiuj prikantas la malnovajn mitologiajn kredojn. Ŝveter kolektis kaj publikigis grandan nombrön. Volumojn da finnaj popolkantoj eldonis ankaŭ Topelius kaj Gottlung.

La unuaj libroj presitaj en finna estas ŝuldataj al la luterana reformulo Agricola (1508—1557). Li kunmetis la unuan finnan alfabeton, tradukis la Novan Testamenton, predikojn, k. t. p. Liaj verkoj estis presitaj en Stockholm, ĉar en Finnlando ne ekzistis presejo. De post 1616 la instruado disvastiĝis rapide, kaj lernejoj fondiĝis ĉie. En Abo estis malfermata la unua finna gimnazio, kaj en 1640 fondita universitato; oni starigis presejon, librejojn. Kompreneble unuatempe la sveda lingvo estis preferata, kaj la finna estis konsiderata kiel barbara. E. Petreus kunmetis la unuan finnan gramatikon. La kono de la popola lingvo disvastiĝis. La nacia konscio

ekformiĝis; jam en 1739 rezolucio de l' deputataro postulis, ke la reĝo oficistigu nur personojn sciantajn la finnan.

Porthan (1739—1804) famiĝis kiel historiisto. Li redaktis depost 1770 la unuan ĵurnalon publikigatan en Finnlando, la *Abo Tidning*. Li turnis sian atenton al la trezoroj de l'nacia poezio, kiam Mac Pherson publikigis sian *Ossian*, kiun kelkaj rigardas kiel egalvalora al Homero.

De 1828 ĝis 1832, D-ro Elio Lönnrot travojaĝis piede Karelion, haltante en ĉiuj vilaĝoj kaj enskribante la rakontojn de la maljunuloj. Li kolektis la rapsodiojn kaj estis mirigata de la granda eposa spirito, kiun oni ofte rimarkis en ili. La rezultoj de liaj serĉoj kaj de lia genio estis la *Kalevala*, kiu aperis en 1835. Tuj, tiu ĉi verko estis alte taksata en fremdlando kaj tradukata en la ĉefajn lingvojn. Multaj literaturistoj, kiel Victor Hugo, Sainte-Beuve, Guizot k. a. ŝatis la belaĵojn de tiu verko tiel malsama de tiuj, al kiuj la latina spirito estis kutimigita. La *Kalevala* enhavas du partojn. La unua temas pri la bela filino de Pohjola (la nordo, Laponio), „gloro de l'tero, ornamaĵo de l' ondo . . . , brilanta en siaj blankaj vestoj“ per tri herooj de la lando Kalevala (Finnlando). Tiuj herooj estas: la maljuna Väinämöinen, la dia kantisto, kiu personigas la finnan poezion, Ilmarinen, la lerta forĝisto de Sampo, speco de talismano deziregata de ĉiuj, kaj Lemminkäinen, la gaja deloganto. Ilmarinen, dank' al la magia helpo de la filino de Pohjola, venkas siajn konkurantojn, kaj oni aranĝas belegan edziĝceremonion, kie Väinämöinen kantas unuafoje la devenon de l' biero, „la fama trinkaĵo naskita de lupolo, veninta en la mondon helpe de l' akvo kaj de l' arda flamo.“ La dua parto estas dediĉita al la serĉado de Sampo, restinta en Pohjola post la edziĝo de Ilmarinen. La tri malnovaj konkurantoj unuiĝas en tiu ekspedicio. Post multaj luktoj, kie triumfas Väinämöinen, dank' al sia magia potenco kaj al la ĉarmo de l' kantoj, kiujn li diras akompanante sin per la melodia *kantelo*,¹ la herooj de Kalevala havigas al si Sampon kaj forkuras sur la maro; sed „la familia patrino“ de Pohjola, transformita en aglon, atingas ilin, kaj Sampo rompiĝas dum ŝi volas ĝin kapti. Ŝi povas alporti nur fragmenton al Pohjola, de kio devenas la malriĉeco de ŝia lando.

¹ Nacia muzikinstrumento.

Kontraŭe al la Iliado aŭ al la Roland-kanto, la Kalevala gloras malpli la potencon de l' glavo ol la potencon de l' kanto kaj de l' parolo; la venkanto ne estas ĉiam la plej fortbraka, sed la plej saĝa, kiu posedas „la naskvortojn.“ Nome finnoj pensis, ke kiu konas la originon, la naskiĝon de io malbona, tiu povas ĝin kontraŭbatali kaj venki (tre moderna ideo!)

La Kalevala donis la impulson al la finna arto. La muziko de Jean Sibelius, la plej granda komponisto de Finnlando, estas inspirita de ĝi; la plimulto de la pentristoj ĉerpis de tie temojn. La finnaj poetoj kiel Kivi, Erko, Eino Leino, same kiel la fremdaj Longfellow, Leconte de Lisle, Fogazzaro, elpruntis nemalmulte da motivoj de tie.

En 1840, Lönnrot publikigis kolekton de lirikaj poezioj titolitan *Kanteletar* (La citrolino). Julius Krohn, konata kiel poeto sub pseŭdonimo Suonio, kaj lia filo, profesoro Kaarle Krohn, provis komprenigi la internacian signifon de la granda eposa poemo Kalevala.

Dum ĉiuj ĉi verkistoj estis influataj de ideoj pure finnaj, naskiĝis alia tendenco en la verkoj de la plej fama finnlanda poeto de sveda lingvo de l' XIX^a jc.: Runeberg (1840—1877). Li forlasis la imiton de la svedaj literaturaj skoloj kaj baldaŭ fariĝis la unua sveda poeto-romanverkisto de sia epoko, animita de pure finnaj sentoj. Kiam pro la brulado en 1827 en Abo oni transportis la universitaton en Helsingforsen, Runeberg enloĝiĝis en la novan ĉefurbon, kie li fariĝis instruisto kaj ĵurnalisto. Li atakis precipe la svedan romantikecon, kaj en siaj originalaj verkoj li klopodis priskribi la veran vivon de l' popolo, tre frue antaŭ la triumfo de l' realista skolo en Skandinavio. Li publikigis serion da lirikaj poeziaĵoj, titolitaj „Idilioj kaj Epigramoj“. Poste li aperigis la poemon „Espero“, „La reĝo Fialar“ kaj precipe sian ĉefverkon „Historioj de la leŭtenantaspiranto Stol“, kortuŝaj rakontoj el la milito 1808—1809 kuniginta Finnlandon al Rusio.

La unua originala finna komedio *Nummisuutarit* (La botistoj) estas verko de Kivi (1834—1872), kiu verkis ankaŭ la tragedion *Kullervo* el epizodo de la Kalevala. J. Koskinen (1830—1903), historiisto kaj romanisto, priskribis la tre malgajan sorton de la vilaĝanoj sub la sveda reĝimo kaj la finnan ribelon de la kampuloj. S. Ivalo (n. 1866) uzis sian talenton ankaŭ por la defendo de l' subpremitoj kaj libereco de sia lando.

Talenta virino, Minna Canth (1844—1897) enkondukis la socialismon en la romanon. Antaŭ ŝi oni atribuis la maljustecon al la universala ordo, kaj serĉis konsolon en la religio. Minna Canth unua protestis kontraŭ tiu vidpunkto. La situacion de l' virino, la laborekspluatadon, ĉion ŝi senkompatate kritikis. Sub la influo de Ibsen ŝi skribis la dramojn: „La laborista edzino“, „La pastra familio“, „Sylvi“ ktp., sed ŝi ankaŭ estas influita de Tolstoj. Minna Canth estis la unua tolstojanino, sed nun la adeptoj de l' profeto de Jasnaja Poljana grupiĝas ĉirkaŭ Arvid Järnefeldt (n. 1861), filo de generalo, forlasinta la juristan karieron, la lukson, la sendependan vivon, ellerninta la metion de forĝisto, fariĝinta vilaĝano por pli bone koni la dolorojn kaj mizerojn de la laborista vivo. Liaj plej gravaj verkoj estas „Konfesoj“, kaj „Taglibro de vojaĝo en Rusio“.

Aho (n. 1861) priskribas kun rava mildeco la amprintempon de knabino, ŝian brulsomeron, ŝian ventaŭtunon, dum kiu la betuloj lasas fali melankolie siajn foliojn... En tiu speco neimiteblaj estas liaj du romanoj: „La pastra filino“ kaj „La pastra edzino“. Li estas lerta priskribanto de l' vilaĝa vivo kaj vera majstro de l' novelo.

En la verkoj de Irmari Rantamala, Ilmari Kianto, Joel Lehtonen, Travaststjerna oni vidas la influon de Strindberg kaj Nietzsche, de Leonid Andreev kaj Maksim Gorkij. Inter la nuntempaj lirikistoj kaj romanistoj oni ne devas forgesi Jalmar Prokope kaj Nino Runeberg. El la finnaj poetoj nomindaj estas ankaŭ: Ahlqvist (Oksanen), Cajander, Erkkö, Granlund, Ingman, Jaennes, Kallio, Kiljander, Kymaelaeinen, Kramsu, Lyytinen, Makkonen, Poppius, Pahakka, Rahkonen, Tuokko, Vuorinen, Raikkonen. Inter la romanistoj: Egmelaeus, Bergman, Friman, Tyko Hagman, Sofia, Hahnson, Jahnsson, Kauppi-Heikki, Minna Krohn, Puhakka, Päivärinta, Soini. Oni povus kovri paĝojn per nomoj de eminentuloj en la dramarto, kritiko, historio, teologio, vojaĝoj, filologio kaj filozofio. La sciencoj en ĉiuj branĉoj havas fervorajn laborantojn (ŝtatsciencisto kaj filozofo Snellman, filologoj M. Castren, E. Setälä, folkloristo K. Krohn, sociologo Westermarck, alkohologo Laitinen, psikoterapo Sibelius, ĥirurgo Tiquerstedt), same kiel la artoj (mondfamaj pentristoj Albert Edelfelt kaj Akseli Gallen-Kallela, komponisto Sibelius, k. a.).

Finnlando estas akvoriĉa, malvarma lando, kies grundo ne estas tre fruktodona; nur en la sudo oni ricevas belajn rikoltojn dank' al la obstina laboro de la loĝantaro. La vintro estas tre malvarma kaj longa: ĉirkaŭ sep monatojn en la nordo; la somero estas seka kaj varma, favoranta energian vegetaĵon kaj la cerealojn. La ĉefaj lagoj estas Saĥma, Paĥjane kaj pli norde Enare, kaj la ĉefaj urboj: Uleaborg, Vasa, Abo, Nyland, Viborg, Kuopio, San Mikkel kaj Tavastehus. La plej konsiderinda komerca centro estas Helsingforso, kies monfontoj konsistas precipe el ligno, fermaĵo kaj fandaĵo. La komercon helpas bona kanalreto. Preskaŭ ĉiuj komercaĵoj estis senimposte alportebaj el Rusio en Finnlandon, dum la transportimpostoj el Finnlando al Rusio estis grandaj. La industrio estas en sia ĝermo.

La finnoj estas persistaj, ordamaj, instruitaj. Malgraŭ la malfavoraj cirkonstancoj de l' klimato kaj de l' grundo, ili sciis krei prosperan industrion, kiu, dank' al la tre modera dogantarifoj de la grandduklando, venke konkurencis sur la rusa vendejo la rusajn produktojn, pli karajn pro la alteco de l' enirimpostoj pri la krudaj materioj. Precipe pro tiu konkurenco la finnoj devis suferi de la rusaj komercistoj kaj industriistoj, tiel same kiel la baltaj popoloj de la germanaj terposedantoj.

Oni scias, ke la finnoj estas unu el la plej instruitaj, plej progresemaĵoj popoloj de Eŭropo. Naturdotita per granda energio, tiu ĉi popolo sciis fari el sia marĉa tero, sub malamika klimato, landon produkteman, teron fruktoportan. En la estonto ĝi sendube marŝos ĉe la unua rango de la malgrandaj nacioj. Finnlando jam naskis grandajn pentristojn, talentajn skulptistojn, unu aŭ du muzikistojn, kies verkoj ekakiras grandan sukceson en fremdlando.

Estas do videble, ke Finnlando sekvis ĉiujn vojojn de l' progreso, kaj la finna popolo ne povas plendi, ke ĝi malfruigis en sia evoluo kaj en sia intelekta progreso.

Konataj estas la simpatioj por Finnlando kaj ties deziro definitive apartiĝi de Rusio kaj ĝui plenan liberecon. Ni esperu, ke la paco alportos la liberecon al tiu popolo, kiu ĝin meritas tiom pro siaj suferoj, kiom pro siaj kapabloj.

La Tataroj

Inter la popoloj, kiuj loĝis centran kaj nordorientan Rusion, unuaj atingis sufiĉe altan gradon de civilizo la bulgaroj, devenintoj de la uralo-altaja raso, kiuj instaligis en la supera baseno de Volga (de kie ilia nomo). La tataroj estas la idoj de la malnovaj bulgaroj kaj de kelkaj aliaj turko-bulgaraj popoloj pli malfrue venintaj el Azio. La tataro nacio formigis jam antaŭ multaj jarcentoj, havante kiel centron la antikvan bulgaran civiton Kazan. Tio okazis en epoko, kiam la rusoj ne estis ankoraŭ komencintaj konstrui preĝejojn laŭlonge de la rivero Oka, kiam oni aŭdis jam versetojn el la Korano ĉe la bordoj de Volga kaj Kama. Laŭ la fama araba vojaĝisto Ibn-Fondlan, la bulgaroj, konvertitaj al mohamedanismo en la X^a jc., servis kiel perantoj inter la mohamedana mondo kaj la popoloj de norda Eŭropo. Ilia granda civito estis ŝanĝcentro por la produktado de la mohamedanaj landoj kaj tiuj de Eŭropo kaj Siberio. Tiel, de nememorebla tempo, mohamedana Azio kreis tie ĉi fokuson por sia civilizo, kaj ne nur por ŝirmi siajn vagantajn hordojn.

La ĉefa subdivido de la tataroj estas tiu de Kazan. Oni trovas ilin dissemintaj inter la rusoj kaj la finnaj triboj, en la urboj kaj vilaĝoj, ĉe la bordoj de Volga, de la enflanto Oka kaj ĉe la enflantoj maldekstre de Kama. Ili formas gravan parton de la loĝantaro de la gubernioj Kazan, Samara, Simbirsk, Penza kaj etendiĝas ĝis en la gubernioj Saratov, Viatka, kaj Perm. Oni trovas ilin ankaŭ en la gubernioj Tambov kaj Riazan. Ĉiuj ĉi fruktodonaj teritorioj, antaŭ la tataro alveno en Eŭropo, kiel jam dirite, estis okupitaj de aliaj turkaj triboj kiel la bulgaroj, kiuj ne plu estis nomadoj; la tataroj, instaliginte en la centro de tiuj terkulturaj triboj, baldaŭ perdis siajn nomadajn morojn kaj sian invademon.

La tataroj de Kazan, al kiuj rilatiĝas la baŝkiroj, la miŝeroj kaj la tibteroj, kiujn nenio esenca distingas de la

unuaj, konsistigas sufiĉe kompaktajn masojn en la basenoj de la riveroj Volga, Kama, Ak-Itil kaj Oka, samkiel la okcidenta deklivo de Ural-montaro. Ili estas ankaŭ renkontataj en la eŭropaj kaj aziaj teritorioj de la malnova rusa imperio kaj kreis, fandiĝante kun la lokaj popoloj de la sama raso, sufiĉe gravajn fokusojn, ĉu en la ĉefurbo de l' imperio, ĉu en la ĉefaj urboj de l' provincoj. Kazan kvazaŭ disfluigis koloniojn en tutan Rusion.

Baziĝante sur la rezultoj de la lasta oficiala popol kalkulado de la rusa registaro, en 1897, kaj sur la kalkuloj de la hungara etnografa societo, oni povas taksii la tutan nombron de la tataroj je 5 milionoj. Ili formas la absolutan plimulton en la gubernio Ufa kaj en kelkaj distriktoj de la gubernioj Kazan kaj Orenburg. Krom la Kazanaj ekzistas ankaŭ Krimeaj tataroj, kiuj lastatempe proklamis respublikon en Bakĉi-Saraj, la malnova ĉefurbo de l' hanoj. Estas ankaŭ tataroj en Kaŭkazio, Siberio kaj Turkestanto. Tiuj en Kaŭkazio ĉirkaŭ Baku organizis sin antaŭ nelonge en la t. n. Azerbejĝana Respubliko.

* * *

La rusoj, nomitaj de siaj malnovaj malamikoj *polovci*, kiuj estis atakitaj de la mongoloj venintaj el la centro de Turkestanto kaj de Ĉinio, antaŭeniris al tiuj barbaroj, kiujn ili renkontis ĉe la bordoj de rivero Kalka. La rusa armeo preskaŭ tuta pereis (1224). Dum dektri jaroj la mongoloj kontentiĝis militadi en Ĉinio, sed en 1237 Bati, pranevo de Ĉengis-Ĥan, konkeris la grandan urbon de la „polovci“ kaj marŝis kontraŭ Riazan, ĉefurbo de unu el la rusaj ŝtatoj, kiu estis cindrigata. La tataroj fine ekokupis perforte la ĉefurbojn de multaj ŝtatoj: Rostov, Susdale, Jaroslav, Tver, kaj ĉie la loĝantaro estis buĉata, la lokoj transdonataj al la flamoj. De 1239 ĝis 1240 la azianoj bruligis Perejaslav, Ĉernigov, Kiev; tiuj urboj estis sieĝataj kaj rabataj, la princoj kaj iliaj regatoj dispecigataj. La invadantoj, nombre pli ol 500,000, kovris la landon. Baldaŭ ili konkeris Volinon kaj Galicion. Tiel tuta Rusio, escepte Novgorod kaj la nordo, apartenis al la mongoloj. Ili alvenis ĝis Hungario, batalis ĉe Liegnic, en Silezio, sed devis sin retiri ĉe la apero de la germanaj kaj polaj armeoj.

Bati starigis ĉe malsupera Volga civiton, nomitan Sarai (la kastelo), kiu fariĝis la ĉefurbo de potenca imperio. La „Ora Hordo“ tenis dum du cent jaroj Rusion en sklaveco. La tataroj, kiuj estis idolanoj dum siaj unuaj militiroj mohamedaniĝis en 1272 kaj fariĝis fanatikaj defendantoj de Islamo. La invadintoj ne penis tatarigi la rusojn, ĉiu popolo konservis siajn regadon kaj morojn, sed ĝi devis pagi pezan popersonan tributon, kaj ĉiu, kiu ne povis ĝin pagi, fariĝis sklavo. Ĉiu popolo devis ankaŭ liveri soldatojn al la „Ora Hordo“, kiu uzis ilin por kontraŭbatali unu post la alia la malgrandajn rusajn princojn, sed la tataroj montris grandaniman toleremon al la religio de siaj tributantoj.

La Moskvaj princoj, submetiĝinte al la tataroj, povis iom post iom pligrandigi sian potencon. Kiam la rusaj princoj sin sentis sufiĉe fortaj, ili rezistis al la Hordo. Oleg de Riazan venkis la tataran ĉefon Tagaj; Dmitri de Moskvo atakis Kazan'on. En 1378, tiu princo ĝuis grandan venkon ĉe la bordoj de Voja, en la lando de Riazan. La tataro ĥano Mamaj furioza kolektis grandegan armeon el ĉiuj tributantaj popoloj; li estis helpata de Jagellon, grandduko de Letonio kaj reĝo de Polio, kiu perfidis la kristanojn. Dmitri Donskoj, la grandduko de Moskvo, trapasis la riveron Don kaj atakis, malgraŭ sia malplimulto, la potencon armeon de Mamaj apud Kulikovo. Estis unu el la plej grandaj bataloj de l' historio (1380). Ĝi ŝancelis la tataran jugon, sed ne liberigis Eŭropon de la azia minaco. Post la malmobilizo de la rusaj armeoj, Dmitri ne povis rezisti al ĥano Toĥtamisk, kiu konkeris Moskvon kaj ĝin bruligis. Dmitri denove vasaliĝis. Lia filo, Vasili I^a (1389—1425) vidis sian landon dezertigata de la mongolo Tamerlan, kiu venkinte Buĥarion, Iranon kaj parton de Hindio, turnis siajn armeojn kontraŭ Eŭropo. Pli malfrue Edighei, ĉefo de l' tataroj, atakis Vasili'on, kiu ne plu pagis sian tributon; li atingis Moskvon, kiu estis reviviĝinta el siaj ruinoj, ĝin rabis kaj altrudis grandegan reaĉetpagon (1408). Vasili Vasiliieviĉ estis prenata de la tataroj, sed li povis baldaŭ sin reaĉeti. Sub la regado de tiu monarko, la monarkio Kipĉak (aŭ Ora Hordo) dispeciĝis. Formiĝis du ŝtatoj: Kazan kaj Krimeo. Princo Ulu-Mahmud kaj lia filo rekonstruis Kazan'on; ili faris el ĝi sian ĉefurbon kaj altrudis sian super-

regadon al la triboj de Volga: ĉuvaŝoj, ĉeremisoj, bulgaroj de Kama. La ĥanlando Krimeo estis ankoraŭ pli potenca ol tiu de Kazan. Dum 300 jaroj ĉi tiuj tataroj estis preskaŭ konstante en milito kontraŭ Ukrainio, Moskovo kaj Polio. La unua ĥano de tiu dinastio estis Azi-Girei.

Ofte la ĉefoj de l' tataroj de ambaŭ ĥanlandoj memvole soldatiĝis en la rusaj armeoj kaj atingis altajn gradojn. La rusoj permesis al ili establiĝi ĉe siaj limregionoj; tiamaniere establiĝis la ĥanlando Kasimov (en la nuna gubernio Riazan). Sed la grandduko de Moskvo nominte Ŝig-Alei, de Kasimov, ĥano de la Krimeaj tataroj, iu Krimea princo Maĥmet Girei, helpata de la kozakoj, atakis Rusion kaj la Kazanajn tatarojn, venkis la rusojn ĉe Oka kaj direktiĝis al Moskvo; la grandduko submetiĝis kaj promesis pagi jartributon. Tiam la ĥano reprenis la vojon al Krimeo, sed survoje li estis atakata de generalo nomita Ĥabar, kiu forprenis de li la traktaton subskribitan de la grandduko. Post nelonge Maĥmet estis mortigata de la Nogajoj (1521). Vasili forpelis la Girei'ojn el Kazan kaj devigis la novan ĥanon sin deklari vasalo de Rusio. La unua ago de l' ĉefo estis la malpermeso al la rusaj komercistoj viziti la foiron de Kazan, kaj la fondo de la foiro de Nijni-Novgorod, kiu ankoraŭ ekzistas.

La posteulo de Vasili estis Ivan IV^a alnomita la Terura (1533—1584). Ni ne parolos ĉi tie pri la interna politiko de tiu monarko, kiu tremigis sian popolon, sed pri lia milito kontraŭ la Kazanaj tataroj. Tiuj ĉi, renversinte la rusan protektiton kaj vokinte sur la tronon Edigher, princo Nogaj direktiĝis kontraŭ Kazan (1552) kun armeo da 150,000 viroj. La tataroj kaj iliaj helpantoj de Krimeo, Astrahano kaj Persio, estis bravegaj, sed post sesmonata sieĝado la urbo estis atakprenata. Ivan la Terura pendigis sur la remparoj de Kazan la tatarajn militkaptitojn kaj indulgis neniun publikan konstruaĵon. Li detruigis moskeojn, lernejojn kaj bibliotekojn. Li devigis multajn centmilojn da tataroj, malkonfesi la patran religion (ilia nacia kaj religia sento estas tamen tiel forta, ke granda parto de la perforte kristanigitaj tataroj, post 400 jaroj da subpremo, revenis tuj al Islamo). La tataroj pereis po miloj en la lukto. Post kvar jaroj la Astrahana ĥanlando estis ankaŭ aneksata al Rusio. Tio estis la

fino de la militiroj kaj de la jugo de l' tataroj de la „Ora Hordo“, sed tiuj de Krimeo daŭrigis dum du jarcentoj siajn rabojn. Devlet Ghierei atakis Rusion en 1571, bruligis Moskvon, mortigis tie grandan parton de la loĝantaro kaj forportis 100,000 kaptitojn. La sekvantan jaron, li renovigis sian ekspedicion, sed estis venkata.

Depost la falo de Kazan, la rusoj fiksiĝis ĉe ambaŭ flankoj de Volga, inter la tataraj aŭ finnaj triboj. Ili alportis iom da civilizo, konstruis komunikvojojn, grandaj ŝipoj navigis sur Volga. La paco regis ĝenerale inter la rusoj kaj iliaj regatoj.

* * *

La tataraj lingvoj estas branĉo de la turanaj lingvoj. La skriba literaturo, kiu datas de tre malproksima epoko, rapide kreskis precipe depost la mezo de la XIX^a jc. Tamen estante preskaŭ subpremita de la rusa tiraneco, la tataraj lingvoj ne produktis superajn verkojn; la religiaj diskutoj abundas, sed la seriozaj verkoj mankas, escepte kelkaj libroj pri historio kaj poeziaĵoj. La estonteco vidigos, ĉu la tataroj estas kapablaj naski poetojn kaj verkistojn de monda graveco. La nombro de la tataraj ĵurnaloj kaj revuoj dum la jaroj 1905 kaj 1906, kiam ili ĝuis relativan liberecon, atingis ĝis dudek. La naciaj lernejoj laŭ moderna tipo progresis ankaŭ mirinde dum tiu liberala periodo. La rusa registaro, post la revoluciaj jaroj, adoptis ankoraŭ pli severajn limigojn rilate al la lernejoj, „medreseoj“ (duagradaj naciaj lernejoj), literaturo kaj gazetaro. La premo sur la lernejoj kaj verkoj tataraj pligrandiĝis, proporcie al la intelekta vekigo kaj progreso de tiuj popoloj. Oni forĝis leĝon por malpermesi la instruadon de la nereligiaj temoj, laŭ la plej mallarĝa senco de l' vorto, en la patra lingvo; ĉiuj aliaj temoj, aritmetiko, historio, geografio k. t. p., devis esti instruataj ruse. Oni plifortigis tiun leĝon per alia malpermesanta la instruadon, en la „medreseoj“, de ĉiuj temoj konsiderataj de la ortodoksa rusa registaro kiel nereligiaj! Fine, leĝoprojekto estis ellaborita, per kiu la patra lingvo en la unuagradaj lernejoj fariĝis simple ilo por ellerni la rusan. Oni do ne rekonis la ekzistadon de la nacia tataraj lingvoj.

* * *

Ĉiu persono, kiu loĝas inter la tataroj, frue vidas, ke ili neniel estas kruelaj, ke nenie la gastameco estas tiel malavara kiel ĉe ili, ke ili estas tre superaj al la plimulto de la popoloj en Eŭropo laŭ sobra vivo; tataro drinkema estas maloftulo. La grandaj rusaj firmoj preferas dungi kiel veturigistoj tatarojn, ĉar oni scias, ke tiuj lertegaj veturigistoj ne malsobriĝos, ne elmetos la prezĉevalojn al vundigo kaj ne vendos siajn livreajn peltvestojn por drinki. Aliflanke la pureco estas multe pli ĝenerala ĉe la tataroj ol ĉe la rusaj mujikoj. En la distriktoj, kie estas miksitaj vilaĝoj, mohamedanaj kaj kristanaj, oni vidas tuj la diferencon. La tataraj kvartaloj estas pli puraj, pli bone prizorgataj ol la rusaj partoj. Oni vidas preskaŭ ĉie la litajojn ĉe la fenestroj de la tataraj *isba*'oj. La tataro estas tre kapabla por progreso. Li estas bona negocisto, komercisto, industriisto, kaj la plimulto de la vendistoj de feloj, tapiŝoj, k. t. p., estas aziaj tataroj. La malbona reputo, kiun oni faris al tiu popolo, venas el la invadoj de Ĉengis-Han kaj de Timur-Leng (Tamerlan), kiuj pelis antaŭ si la tatarojn kaj faris terurajn dezertigojn en Rusio kaj Ukrainio.

Ĉiuj sociaj klasoj estas reprezentataj inter la tataroj; sed la komercista burĝaro kaj la terkultura klaso superas. La nobelaj familioj estas relative maloftaj, ĉar tiu klaso plej multe suferis sub la rusa regado. Al tiuj diversaj klasoj oni devas aldoni la intelektulojn, kies rolo estas prizorgi la spiritajn bezonojn de la loĝantoj kaj doni direkton al iliaj ideoj, tio estas la imamoj, aĥondoĵ (pastroj), instruistoj, profesoroj, kuracistoj, advokatoj, verkistoj, k. t. p. Membroj de tiuj klasoj kaj precipe de la burĝaro sin dediĉis al la granda industrio, kies plej gravaj fokusoĵ troviĝas en Simbirsk, Saratov, Kazan kaj Orenburg. Estas en la gubernioj Simbirsk kaj Saratov dekduo da tute modernaj drapfabrikoj, el kiuj kelkaj okupas ĝis 2500 laboristoj. En Uralmontaro kelkaj oraj kaj platinaj minejoj apartenas al la tataroj. La tataroj servas kiel perantoj en la komerco inter Eŭropa Rusio kaj Azio; ĝi estas tradicio ĉe ili. Kazan estas nuntempe centro de presado kaj eldonado por ĉiuj mohamedanoj de Rusio, escepte de Kaŭkazio.

La sufiĉe alta ekonomia nivelo de la tataroj certigis al ili la konservon de ilia nacia kaj religia personeco, protek-

tante ilin kontraŭ la rusigado kaj eĉ garantianta ilian progresadon.

Laŭ la iniciato de la Kazanaj tataroj estis fondata la politika partio de ĉiuj mohamedanoj en Rusio, nomita „Alianco de la Muslimoj en Rusio“. Ĝi elektigis 30 deputitojn je la unua Duma kaj 39, el kiuj 10 estis tataroj de Kazan, je la dua. La ŝtatperforto de 3 junio 1907 estis fakte direktita pli kontraŭ la nerusaj popoloj ol kontraŭ la rusa demokratio. Per tiu kontraŭjura leĝo, la elekto de tataraj deputitoj fariĝis malfacila. La tria Duma havis nur 3 deputitojn. Ofte ili plendis al la Duma, ke iliaj modestaj postuloj ne estas konsiderataj.

La tataroj postulis nome: 1^e egalecon de la civilaj kaj politikaj rajtoj kun la rusaj ortodoksoj; 2^e kulturalan liberecon kaj aŭtonomion, t. e. libereco kaj aŭtonomio de la lingvo, instruado kaj religio de la tatara nacieco.

La tataroj pruvis sian viveblecon kaj eksterordinaran energion dum ĉiuj renversegoj de la pasintaj epokoj, kaj ili rajte esperas, ke fine iliaj aspiroj trovos eĥon en la kultura okcidento, kie decidiĝas la sorto de la nacioj.

Georgio

Kaukazo estas unu el la plej pentrindaj kaj prikantataj regionoj de Rusio. Parto de ĝi, kiu rajte povas esti nomata perlo de Kaukazo, estas Georgio, nomata ruse Gruzio, kaj kies loĝantoj mem ĝin nomas *Kartveli* aŭ *Karthli*.

Georgio limas nordoriente al Daghestano, norde al Kaukazo, sude kaj sudoriente al Armenio kaj la turkaj provincoj de Malgranda-Azio. La plimulto de la geografoj donas la nomon Georgio al la suda parto de la Kaukaza istmo, depost la flankoj de la ĉefa Kaukaza montoĉeno ĝis la limoj de Armenio kaj Persio sude, kaj de Nigra al Kaspia maroj. Tiu nomo estas nur proksimuma, ĉar la landoj ampleksitaj en tiuj limoj ne apartenas ĉiuj al Georgio, kaj ĉiuj popoloj tie ne parolas dialekton de la georga lingvo. La teritorioj submetitaj malnovtempe al la reĝlando Georgio tiel ofte ŝanĝis rilate areon kaj estrojn, ke estas neeble sin bazi sur la historio aŭ sur la antropologio por indiki ekzakte, kio apartenas al Georgio. La malnova reĝlando, kiun la rusoj posedas depost 1802, formis la guberniojn de Tiflis, Kutais kaj Batum, ampleksantaj 93,000 km².

La kaukaza loĝantaro konsistas precipe el kvar elementoj: georgoj, montanoj, tataroj kaj armenoj. La georgoj okupas la centran kaj sudokcidentan partojn de kaukazo. Ilia nombro superas 3 milionojn: 2,500,000 estas kristanoj ortodoksaj kaj katolikaj, kaj ĉirkaŭ 400,000 mohamedanoj. La nomo Georgio devenas de la landa protektsanktulo Georgo.

La georgoj estas bravaj, gajaj, senzorgaj, drinkemaj, gastamaj. Ili estas kavalira popolo. Oni trovas inter tiuj veraj reprezentantoj de la kaukaza raso la plej belajn homojn de la tero: la beleco de l'virinoj estas fama en la tuta Oriento. Ili havas altan staturon kaj majestatan vizaĝon kun belaj trajtoj kaj malhelajn bukajn harojn. Kiu vivis en Rusio, rememoras pri la militaj gruzoj, kiel ili estas tie nomataj,

kun la karbnigraj okuloj kaj potencaj barboj en la ĝis genuo atingantaj jakoj, kun la longaj fermitaj manikoj kaj la puntaj ŝaffelĉapoj. Oni vidis ilin apud la ĉerkesoj en la plezurejoj de la rusa ĉefurbo, kie ili kiel luktistoj kaj dancistoj atake konkeris la virinajn korojn. La plej frapantaj ecoj de la georgoj estas pasio, kiu facile degeneras en koleremon, sentemo kaj honoramo, ambicio kaj pompeco. La diversaj branĉoj de la sama popolo estas: la georgoj, kiuj nomas sian landon Karthli aŭ Sakartuli kaj loĝas la plej grandan parton de la rusa gubernio Tiflis; la imeretoj loĝas la orientan parton de la gubernio Kutais; la guroj en sudoriento de la sama gubernio, ĉe la bordoj de Nigra-maro; la mingreloj vivas en la sama gubernio Kutais, norde de la guroj. Ĉiuj aliaj gentoj de la georga raso vivas en la montoj; ili estas tre batalemaj kaj rabemaj. La plej rimarkindaj estas la svanetoj; ili havas morojn kaj ideojn religiajn, kiuj apartigas ilin de la ceteraj georgoj. Ĉiu domo formas fortikaĵon — ili ja restis plej longe sendependaj el ĉiuj kaŭkazanoj. Ili havas blondajn harojn. Ilia religio estas miksaĵo de idolkulto, kristanismo kaj mohamedanismo. Similaj al ili estas la ĥevsuroj, tuŝinoj kaj pŝavoj, okupiĝantaj ekskluzive pri bestbredado. Precipe la unuaj estas disputemaj, militemaj kaj eliras preskaŭ neniam nearmitaj, kiel en la mezepoko.

La politika historio de Georgio estas ŝanĝoplena. Ĝi estas la kontinua defendo de tiu teritorio surverŝita de la sango de ĝiaj filoj, la defendo de sufiĉe alta kulturo, kiun tiu popolo inteligenta, laborema kaj dotita de artistaj ecoj kreis dum la jarcentoj de sia disvolvo.

Laŭ la legendoj, la unua reĝo de Georgio, Thagarmos, regis en la III^a jc. antaŭ Kristo (2640). Al Farnas oni atribuas la unuigon en unu reĝlandon de la multnombraj triboj, kiuj ĝis tiam estis sendependaj. Li dividis sian popolon en kastoj. Do, la aristokrata organizaĵo, kiu regis en Georgio ĝis nun, datas de tre malnova tempo.

La unua en la longa vico de la konkerantoj, kontraŭ kiuj la georgoj devis sin defendi, estas la Romano Pompejus, kiu venkis ilin en 65. Ili tamen konservis siajn naciajn reĝojn kaj pli malfrue estis submetitaj al la dinastioj Arsacides, poste al Sasanides, de Persio. Jam frue ili alprenis la kristanismon laŭ greka koncepto. Tio okazis sub reĝo

Mirian, 265—342, helpita de sankta Nino, dua patronino de Georgio. Li ludis la rolon de Clovis kaj de Clotilde en Francio. Konvertita de Nino, li petis Konstantinon sendi al Georgio misiistojn, kiuj, laŭkutime, alportis pecon de la vera kruco, najlon, kiu estis liginta Jezuon al la kruco kaj miraklan bildon de l' Savanto. Post la bapto de Mirian kaj lia edzino Nina en la ĉeesto de l' popolĉefoj, ĉiuj nobeloj sekvis lian ekzemplon. Por plirapidigi la aferon, la Antiokia ĉefepiskopo benis la riveron Kura kaj tiamaniere baptis la tutan popolon. Georgio akceptis ĉiujn grekajn ritojn kaj fariĝis, religie, provinco de la Konstantinopla patriarko. La georgoj devis ofte militi; ili defendis sukcese kaj tre brave sian kredon kontraŭ la persoj kaj mongoloj. En 446 Vaĥtang Gorgaslan supreniras la tronon kaj fondas la nacian patriarkion. Li estis la plej granda militanto de Georgio kaj konkeris multon. En 586 Guram Kuropalate fondis la dinastion Bagratide.

Ĉe la fino de la VI^a jc., por ricevi helpo kontraŭ la senĉesaj atakoj de la persoj, la georgoj sin metis sub la protekton de la bizancaj imperiestroj, kiuj jam frue havis influon en la lando. Submetita al la duobla influo de l' bizanca imperio kaj Persio, Georgio estis konkerita en 732 de la kalifo Merwan II^a. Ĝi sukcesis ribeliĝi kontraŭ la mohamedanoj nur la sekvantan jarcenton, en 861, sed por esti denove regata, en la X^a jc., de la Deilimites, poste de la Buides. La bizancaj moroj kaj artoj estis enkondukataj en la landon de la reĝo Georgo IV^a (1017), kiu edziĝis kun bizanca princino. Tamen la malleviganta potenco de Ostrom ne povis efike ŝirmi la malgrandan popolon, kaj kiam post la mallonga sangtempo sub David II^a, la plej granda el la georgaj reĝoj, kiu liberigis la landon el sub la persoj (1088—1125), en la komenco de la XIII^a jc. ektondris la unua atako de l' mongoloj, la forto de la georgoj estis rompita. De tiam komenciĝis la dekadenco de l' regno, kies signalo estis ja la morto de reĝino Tamari (1212). Ŝia epoko (1184—1212) estis la ora epoko de l' georgia historio. Ĝengis-Ĥan (1222) kaj pli malfrue Tamerlan aŭ Timur-leng (1387), kiuj kun siaj hordoj detruis ankaŭ la malnovan ukrainan regnon kaj enkondukis la jarcentojn daŭranta tatarestrecon en tutan Rusion, dezertigis Georgion kaj devigis

ĝiajn loĝantojn transiri al Islamo. La regno reunuigita, post la skuo de l' tatarjugo, ne povis plu reakiri la malnovan prosperecon. Por sin defendi kontraŭ la konvertpremoj de la persoj, la georgoj vokis al helpo denove kristanan grandpotencon, kiu dume naskiĝis norde de ilia lando: nome Rusio. Post kiam la reĝo Aleksandro I^a estis dismembriginta ĝin inter siaj tri infanoj (1442) en reĝlandojn Kaĥetio, Karthlio kaj Gurio, la pecoj estis sinsekve submetataj, dum la XVI^a kaj XVII^a jc., de la turkoj kaj persoj, kontraŭ kiuj Georgo IX^a (komence de XVII^a jc.) momente alvokis al caro Boris Godunov. La turkoj estris la landon en la fino de la XVIII^a jc., kiam Heraklius II^a, minacita de persa invado, sin turnis al la rusoj, ĵuris obeon en 1793 al la imperiestrino Katerino II^a kaj metis post kvin jaroj sian landon sub la suverenecon de Rusio. Tiu ĉi plenumis sian rolon kiel protektanto de Georgio pli efike, tamen ankaŭ pli profite ol iam Bizanco, kies eklezian heredaĵon ĝi estis ekokupinta.

En 1800 mortas la lasta reĝo de Georgio, Georgo XIII^a, kaj jam en 1802 Paŭlo I^a deklaris Georgion kiel rusan provincon. En 1810 tuta Georgio estas aneksita kaj lokita sub la sceptron de Rusio. Tamen la paco estis malfirma. La tiraneco, kiu regis en Georgio, estis la sama kiel tiu sub kiu ĝemis Finnlando, Ukrainio, Litovio . . . Ankaŭ ĉi tie la loka lingvo estis persekutata. La ortodoksa eklezio de Georgio estis senkapigata je sia georgia ĉefo, la uniatoj estis perforte konvertataj al la oficiala eklezio; la malnovaj kredantoj vidis siajn pastrojn ekzilitaj . . . Unuvorte, Georgio neniel suferis malpli ol la rusa popolo kaj la aliaj naciecoj. La tempoj de la invadoj revenis ĉiam por Georgio. Epoko de teruraj ribeloj komenciĝis en la lando, el kiuj pli gravaj estas tiuj de la montanoj en 1804, de Kaĥetio en 1812, poste en Imeretio, Gurio, Mingrelia, Svanetio.

Sed ĉiuj ribeloj estis sangdronigataj, kaj en la fino de la lukto la rusaj vicreĝoj kaj general-guberniestroj fariĝis absolutaj estroj de Georgio kaj Kaŭkazo . . .

* * *

La filologoj ne interkonsentas pri la deveno de la georga lingvo. Kelkaj faras el ĝi arian lingvon; aliaj, kiel prof. N. J. Marr, formas el ĝi novan grupon nomatan Jafeta, al

kiu ligiĝas la frataj idiomoj al la georga: la mingrela, la lazea, la svaneta, samkiel la lingvo parolata antaŭ la alveno de la armenoj, lingvoj mortaj kaj multnombraj dialektoj parolataj de la kaŭkazaj popoloj. Tiuj Jafetaj lingvoj havas kelkajn similecojn kun la Semidaj lingvoj.

La georga lingvo apartenas al la suda grupo de l' kaŭkazaj lingvoj, kiuj ĝis nun povis esti apartenigataj al neniu alia konata idiomato. Aliparte la strukturo de la georga malhelpas ĝin vicigi en certa klaso de lingvoj: oni trovas tie fleksion, aglutinon kaj polisintetismon. La alfabeto, parenca al la armena, enhavas kvardek signojn. Estas du tipoj de skriboj: la „mhedruli“ estas la plej uzata; la alia, pli arkaika, estas uzata ankoraŭ por la religia literaturo kaj estas nomata „hucuri“. La sonoj de la lingvo estas sufiĉe malmildaj; estas multe da grupoj de konsonantaj kaj siblaj sonoj. La morfologio estas tre riĉa. Oni povas diri, ke la georga skribo ekzistis 300 jarojn antaŭ la kristana tempkalkulo; ĝi estus veninta el Persio kun la enkonduko de la religio de l' magoj. En 302 reĝo Farnaozi enkondukis la alfabeton „hucuri“. La georga estas la literatura lingvo ne nur de la loĝantoj de Karthli, sed ankaŭ de l' mingreloj kaj de l' svanetoj; ĝi estis ankaŭ kulturita de la lazeoj antaŭ ilia islamaniĝo.

La georga literaturo estas tre malnova; ĝi havas pasintecon de dekkvin jarcentoj, t. e. multe pli malnovan ol la franca. Oni povas dividi la georgan literaturon en kvar periodoj: la unua iras de la Va al la Xa jc., kiam regas ekskluzive nur religiaj verkoj seninteresaj por nia epoko. De la fino de l' XIa ĝis la XIIIa jc. naskiĝas kaj kreskas la literaturo. De la fino de l' XIIIa ĝis la XVIa jc. ĝi dekadencas, fine de l' XVIa ĝis la XVIIIa jc. la lingvo renaskiĝas.

Ĉe la tradukado kaj verkado, la Athosa-monto (en Halkediko), sankta por la bulgara renaskiĝo, ludis rolon ankaŭ por la georga. Georgo de Athos verkis en greka la faman himnon „Vesperaj Sonoj“ tradukita en multaj lingvoj. Tre riĉa teologia kaj filozofia literaturo disvolviĝis.

La georga lingvo posedas en prozo tradukojn de konataj persaj romanoj kaj eposaj poemoj. En la Xa jc. la poeto Filipo unua enkondukis la rimon. Ŝota Rustaveli estas aŭtoro de la plej fama malnova georga poemo *Vephkvis tka-*

osani. (La kavaliro kun la pantera felo), tradukita en kelkaj lingvoj. Ĝi estas ankoraŭ konsiderata kiel poeta ĉefverko de Georgio, samranga je la itala „Divina Commedia“. La nemitebla stilo, la riĉeco de l' figuroj, la interesa historio, en kiu montriĝas karakterizaj trajtoj de la georga kavaliro, vivigis depost jarcentoj tiun verkon, kiu vivos ĝis kiam estos georgoj, diras la historiisto Kipŝidze. Ĉiu instruita persono en Transkaŭkazio ĝin lernis parkere, granda nombro de ĝiaj versoj fariĝis aforismoj en la popolbuŝo. La unua parto de l' poemo estas dediĉo al reĝino Tamari, kies laŭpoeto estis Rustaveli. Tiu antaŭparolo enhavas kvazaŭ manifeston de l' poeto klariganta siajn ideojn pri la poezio, la vere kavaliro amo, la sindoneco al la virino fariĝinta preskaŭ adoraĵo. La verso de l' poemo estas deksesilaba, kiu fariĝis populara.

Oni devas rimarkigi, ke la rimo estas tre ŝatata. En la XII^a jc. estas verkoj, kie ĉiu verso dividiĝas en kelkaj versetoj, el kiuj la du unuaj rimas ankoraŭ (internaj rimoj) dum la du lastaj rimas kun ĉiuj ceteraj (eksteraj rimoj). Ifoje oni trovas tutan serion de internaj rimoj, ĉiuj versoj aŭ almenaŭ tri rimas kune. Dank' al tiu riĉeco de rimoj kaj asonancoj, la versoj estas ekstreme sonoraj kaj muzikaj. Citindaj kolektoj de odoj estas tiuj de Ŝavteli, de Ĉaĥruhadze, dediĉita al Tamari, de kie nomata *Tamariani*, prikantanta la grandecon kaj gloron de ŝia lando. Davido la Konstruanto estas la emblemo de politika saĝeco, dum Tamari estas tiu de la milita gloro.

En la XVIII^a jc. renaskiĝo komenciĝas. La reĝoj mem tradukas la plej rimarkindajn persajn verkojn. Reĝo Thejmuraz I^a skribis ankaŭ originalaĵojn; oni ŝuldas al li poemon: „La georgoj“. Alia reĝo Artĉil († 1712) kantas ankaŭ la landheroojn. Reĝo Vaĥtang VI^a tradukis i. a. kolekton de rakontoj kaj fabeloj: *Kalila kaj Dimna*. Dum lia reĝado estis organizita historia komisiono por publikigi la historiliteraturajn monumentojn de Georgio. La plej rimarkinda poeto en la XVIII^a jc. estas Guramiŝvili, kiu lasis historiajn kantojn, aŭtobiografion, didaktikajn kaj religiajn poeziaĵojn inspiritajn de l' pesimismo kaj mistikismo. Tamen lia poemo „Ĝoja somero“ estas animita de realista blovo. Citindaj estas ankaŭ: Besarion Gabaŝvili, princo Georgo Avala kaj princo Ĉolokaŝvili. La plej belaj verkoj de la moderna

literaturo estas presitaj en Tiflis, kie en 1709 ekfunkciis la unua presejo.

Post la anekso al Rusio, la profana literaturo de Georgio ekdisvastiĝas, malgraŭ la baroj kaj persekutoj. Inter la plej distingindaj verkistoj ni trovas la nomojn Ĉavĉavadze, Orbeliani, Eristavi k. a., ĉiuj apartenantaj al la plej alta aristokratio. La unua akiris grandan reputon kiel lirika poeto; liaj poemoj estas en la memoro de ĉiuj georgoj, precipe tiuj, kie li kantas la amon, vinon, ĝojon, kaj priskribas la belajojn de sia lando. N. Baratašvili († 1845) estas influata de Byron, Lermontov kaj eble de Musset; liajn verkojn trapenetras romantikeco. Tamen, doninte liberan flugon al sia pesimismo en „Pensoj ĉe la bordo de Kura“, montrinte, ke ĉiu feliĉo sur la tero estas nekonstanta, ke la vivo neniel estas vivinda, ke la homa koro estas senfunda vazo, li fine tamen instigas la homojn sin oferi, labori por la feliĉo de l' tuta homaro. El liaj plej belaj poeziaĵoj, citindaj estas: „Mia preĝo“, „La templo de l' dezerto“, „Al infano“, „La orfa animo“, „Vesperoj sur Mthazminda“, „La sorto de Georgio“.

En 1850 estis malfermata en Tiflis la unua konstanta teatro, kiu donis grandan impulson al la drama literaturo. Unua nominda dramaŭtoro estas G. Eristavi, kiu ĉerpas siajn temojn en la georga vivo kaj priskribas ĝin kun forta talento kaj granda vereco. Citindaj estas ankaŭ Avkcenti Tsagarelli kaj J. G. Ĉavĉavadze.

La poeto la plej stampita de l' moderna spirito kaj animita de intensa popolamo estas Kazbeck, kiu subskribis siajn verkojn per la nomo Moĉhubaridze (Tumultanto). Li estis revoluciulo, socialisto suferanta pro la senpovo progresigi la kompatindajn montanojn, kiuj lin ĉirkaŭis. Liaj rakontoj, liaj aspiroj al pli bona estonteco estas ravaj. Depost longaj jaroj la ĵurnalo *Droeba* en Tiflis sukcesis kolekti ĉirkaŭ si preskaŭ la tutan intelektan junularon. Ĝia direktanto Meshi donis al ĝi pure demokratan koloron. La persekutoj iom disigis tiun grupon de luktantoj animitaj de plej pura amo al la popolo kaj deziro ĝin progresigi. Unu el ili fondis la revuon *Krebuli*, ludintan, kun la unua, gravan rolon en la intelekta vivo de Tiflis. La revolucio en 1905 ebligis la ekfloriĝon de tuta serio da georgaj ĵurnaloj, ĉiunuancaj. La kontraŭrevolucio ilin forigis.

Estas multaj traktatoj pri la georga literaturo, historio, arkeologio kaj lingvo. La pentrarto, la skulptarto, la arkitekturo ankaŭ floris. Estas same multaj kolektoj de popolkantoj, el kiuj plej citinda estas *Tconguri*, plena je belaj sentoj kaj kortuŝa poezio.

* * *

Ĉe la bordoj de Kaspia-marĉo troviĝas neniam perloj kiel ĉe la sudaj apudlimoj de Persio; en Kaŭkazio kuŝas neniam diamantoj, tamen la bela lando havas „ĉion kion la homoj postulas“. Tutan plenkorbon da donacoj superŝutis la naturo super Kaŭkazon. En la fruktoriĉaj valoj de l' sudo prosperas maizo kaj rizo, maturas fajraj vinberoj, persikoj, abrikotoj kaj melonoj; kotono kaj tabako liveras riĉajn enspezojn, la kulturo de l' silkraŭpo floras. La Kaspia-marĉo estas riĉa je nutrigaj fiŝoj; ĉe ĝiaj bordoj estas rikoltata la bongusta kaviaro. Sennombraj trezoroj ripozas en la montoj: grandaj mangansedimentoj, kupro, ŝtonkarbo kaj hidrargo. En la orienta parto troviĝas riĉaj naft- kaj petrolputoj. Malvarmaj kaj varmaj sulfurfontoj kun temperaturo ĝis 70° fluas multloke, same feracidaj akvoj de alta valoro. La ekonomia signifo de Kaŭkazo estas ekstreme atentinda. Al Georgio apartenas granda parto de tiuj riĉaĵoj.

Georgio estas unu el la plej belaj landoj de l' mondo, lando kiu estus ankaŭ unu el la plej riĉaj, se ĝi estus loĝata de persistaj laborantoj kaj . . . se la scienculoj tiel arde serĉus tie la ĉiuspecajn minojn, kiuj abundas sude de Kaŭkazo, kiel en la okcidentaj landoj ili inventas mortigilojn kaj detruilojn. La teritorio de Georgio estas dividata geografie, per la flankaj montoĉenoj, kiuj unuigas Kaŭkazon al Taurus kaj al la armena montomaso, je du regionoj: okcidente, la baseno de Rioni, rigardanta al la Nigra-marĉo, kun malseka kaj varma klimato, mirinde fruktodona kaj prospera; oriente, la meza kaj malsupra valo de Kura, kun klimato pli kontinenta, pli seka kaj malvarma vintre, sed ankoraŭ fruktodona kaj bone kulturata en la okcidenta parto de l' baseno. La principo, ke la tero devas aparteni al tiu, kiu povas kaj volas ĝin kulturi, estas realigita en Georgio en 1905—1906. La bestbredado estas la granda riĉaĵo de l' montaj regionoj norde kaj sude de la lando.

Georgio kaj precipe Kaĥetio estas la plej fruktiĉa provinco de Kaŭkazo. Tiuj landoj estus eksterordinare produktemaj, se ili estus senmarĉigataj. La arbaroj tie estas superbelaj; tamen la radikoj de l' arboj dronas en la akvo. La grundo de l' valoj estas tre varia. En la prilaboritaj valoj montriĝas abundega vegetaĵo, ĉar la lando estas protektata kontraŭ la nordventoj per la montoj, el kiuj kelkaj estas pli altaj ol Monto-Blanka. En la tuta lando oni neniel konas la froston en la lokoj je malpli ol 1200 metroj da alteco kaj ĉie, kie estas akvo, la tero estas mirige fruktodona. La vinbero kreskas ĉie en la malsupro de l' valoj, preskaŭ ne postulante zorgojn. Apud la marbordoj estas oranĝaj, citronaj, granataj arbaroj, k. t. p. La marĉaj valoj de l' bordoj Kaspiaj estas taŭgaj por la kulturado de la rizo, kotono, teo, sukerkano.

La industrio estas ankoraŭ malgrava. Tiu de silko kaj kotono estas disvolvita. La tabako estas abunde kulturata. Oni trovas minajojn de kupro, fero, plumbo. La karbo ne estas malofta, sed oni ĝin apenaŭ ekstraktas. Oni trovas en la montoj marmoron, jaspon, kvarckristalon, porfiron, rubenon, ambron, agaton, stanion. Se la eŭropaj inĝenieroj kaj kapitaloj estus uzataj tie, la minindustrio kaj tiu de la multvaloraj ŝtonoj baldaŭ florus.

La havenoj, facile alireblaj, kiel Batum kaj Poti, povas servi por ligi Orienton al Okcidento. Pere de Georgio, la grandaj riĉaĵoj de Siberio estus disponigataj al Okcidenta Eŭropo.

Sidanta sur la vojo al Hindio, tiu lando estas ludonta gravan rolon pro siaj nemezureblaj riĉaĵoj. La popolo estas sufiĉe inteligenta por fari rapidajn progresojn, se ĝi ĝuas trankvilecon internan kaj eksteran. La lastan jaron, Georgio proklamis sin sendependa respubliko kaj antaŭ nelonge ĝia popolo demokrate balotis konstituantan deputataron. Nuntempe la registaro klopodas, ke la Paco-konferenco rekonu la sendependecon de la nova ŝtato. Ĉiuokaze devas esti donata la ebleco al la lando por senbare disvolvi siajn ekonomiajn kaj intelektajn fortojn. Ĉiuj vizitintaj Georgion ekamas tiun interesan popolon kaj deziras al ĝi longan pacan kaj liberan ekziston, kiu sola povas alporti al ĝi veran prosperacon.



Etnoĝrafia Karto de malnova Rusio



Skalo 1:12000000

0 100 200 300 400 500 600 700 800 900 1000 KI

Litografio Lips, Bern.

Bulgara Esperanto-Biblioteko

sub la redaktado de gimn. prof. Iv. H. Krestanov, L. K., intencas publikigi aron da broŝuroj pri la internacia lingvo. Iuj el ili enhavos propagandajn artikolojn kaj lecionojn de Esperanto *en bulgara lingvo*, kaj aliaj — histori-literaturajn paĝojn de la konataj bulgaraj verkistoj *en Esperanto*.

Gia celo estas: 1. Interesi pli multe la bulgaran societeton pri tiu grandioza ideo, tiel grava por la vivo kaj estonta progresado de l' homaro, por kiu laboris kaj laboras miloj da eminentuloj en la tuta mondo, kaj 2. konigi al la eksterlandanoj la bulgaran lingvon, literaturon, kulturon, arton k. t. p., kaj montri al la skeptikuloj kun kia facileco kaj precizeco Esperanto, kiu hodiaŭ plene ludas la rolon de internacia lingvo, povas esprimi ĉiujn pensojn kaj sentojn de l' nacia lingvo.

Ĉiu aparta libreto havos difinitan prezon, laŭ la amplekso. Al la abonintoj (tiuj, kiuj antaŭpagis ne palpli ol 5 fr.) 25% da rabato.

Ĉion koncernantan la „B. E. B.“ oni sendu al: Iv. H. Krestanov, pere de Universala Esperanto-Asocio en Bern, aŭ pere de la Esperanto-Oficejo en Pirdop (Bulgario).

La I^a serio de „B. E. B.“ enhavas la sekvantajn libretojn (bulgare):

| | fr. |
|---|-------|
| N-ro 1. Unu horo de Esperanto, laŭ Th. Cart (elĉerpita) | 0. 25 |
| N-ro 2. Sur la vojo al internacia lingvo, laŭ Th. Cart. — La renkonto, laŭ Marie Hankel (elĉerpita) | 0. 25 |
| N-ro 3—4. Rigardo al la internacia vivo kaj lingvo. — Esperantisto, de Iv. H. Kr-ov (elĉerpita) | 0. 50 |
| N-ro 5—6. La profitoj de Esperanto, laŭ M. Jones. — Por kaj kontraŭ Esperanto, laŭ D-ro Vallienne. — La internaciaj rilatoj (pri UEA) | 0. 50 |
| N-ro 7—8. Esenco kaj estonteco de la ideo pri lingvo internacia, de Unuel | 1. — |
| N-ro 9—10. Pri la internacia lingvo, kolekto da artikoloj de diversaj aŭtoroj | 2. — |
| N-ro 11—12. Lernolibro de Esperanto (gramatiko, ekzercaro kaj du vortaroj), de Iv. H. Krestanov, aprobita de la Ekzamena Komitato de B. E. S. kaj de la Ministerio de Publika Instruado | 3. — |

El la II^a serio (esperante):

| | |
|---|-------|
| N-ro 1. La bulgara lando kaj popolo, de Iv. H. Krestanov | 4. — |
| N-ro 2. El la proksima Oriento, de Iv. H. Kr-ov | 2. 50 |
| Bulgara gramatiko por esperantistoj. | |
| Bulgara antologio (preparata). | |
| Baj Ganjo Balkanski, de A. Konstantinov. | |
| Adresaro de la bulgaraj esperantistoj. | |